



DUMONATA KULTURA INFORMILO KAJ ESPRIMILO

Redaktejo : Esperanto, F 47470 BEAUVILLE

Abono en Eŭropo, 1993 : 60 FF. Ekstereŭrope : 80 FF.

Ĝiri al CERCLE AMICAL ESPERANTISTE DE L'AGENAIS

Pĉk : 3371 74 M Bordeaux (mencii same sur bankĉekoj!)

KIEN LA DEMOKRATIOJ ?

En okcidenta Eŭropo, konstatigaŝ perdo de intereso por la politika vivo. Tiu fenomeno estas maltrankviliga kaj devus instigi nin serĉi ĝiajn kaŭzojn kaj eble trovi rimedojn por revigligi la partoprenadon de la civitanoj en la politika agado.

Ĝis antaŭ kelkaj jardekoj, la lulilo de la politiko troviĝis en la partioj. La membroj, okaze de kongresoj, decidis la programon kaj elektis kandidatojn al la parlamento, kiuj poste prezentis sin antaŭ la voĉdonantaro, helpataj de pribalota kampanjo, destinata konigi la programon. La membraro de la partioj estis do la motora elemento de la tuta politika vivo kaj tio estis bona. Nome, ĉiuj civitanoj interesiĝis pri la "res publica" kaj pli malpli influis ĝian evoluon. La deputitoj estis nur la proparolantoj de la volo de la membroj. Tiun volon ili devis respekti por ke ili denove estu elektataj kiel kandidatoj, okaze de sekvantaj balotoj.

Tiu sistemo tute difektiĝis. La politikistoj uzas la partion nur por kontentigi siajn proprajn ambiciojn. La modernaj teknikoj de balota kampanjo postulas grandegajn monsumojn, kiujn provizas profitserĉantaj aferistoj. Korupteco far-

iĝis banalaĵo. La elekto de la kandidatoj estas la rezulto de sekretaj marĉandadoj ene de la partioj. La politikaj eminentuloj amnestias sin reciproke. La skandaloj abundas. La senpovaj civitanoj rigardadas la malrapidan sed certan dekadencan de niaj politikaj moroj.

Kiam ĉesos tio ĉio? Ĉu kiam aperos novaj diktatoroj? Aŭ ĉu ni, la konsciaj civitanoj, klopodos por reveni socion pli honestan kaj dignoplenan?

Roger GARAUDY* proponas solvon al tiu problemo. Kion li sugestas?

La homo denove interesiĝu pri politiko. Sed, kompreneble, sola li/ŝi ne estas kapabla efike agadi. La civitanoj devus subteni la asociojn, kiuj luktas kontraŭ ĉiaj devojiĝoj de la societo. Tiuj asocioj jam ekzistas. Ili povas esti klasifikitaj laŭ kvar grupoj:

1. La asocioj, kiuj helpas aliajn homojn.
(Tipo: Kuracistoj sen limoj)
2. La asocioj, kiuj defendas aliajn homojn.
(Tipo: Amnestio Internacia)
3. La diversaj kooperativaj movadoj.
(Tipo: Mutualaj asekuroj)
4. La kulturaj asocioj.
(Tipo: Artistaj kluboj, kulturaj domoj)

Tiuj agadgrupoj, devenante de la popolo mem, kalkulas milionojn da membroj kaj povus ludi gravan rolon politikan kaj socian. Plie, tiujn asociojn oni certe ne rajtas kulpigi pri kaŝitaj celoj aŭ monavideco, ĉar iliaj estraranoj devas senpage labori. Al neniu profesia politikisto estos permesata membriĝi en tiuj asocioj, eĉ ne ĉeesti iliajn kunvenojn, tiel ke suspektindaj rilatoj ne povu estiĝi inter la politikaj kaj asociismaj rondoj.

Eble, tiu nova grupiĝo de la popolaj fortoj estos renaskiĝo de la civita konscio de la homoj kaj devigos niajn politikajn moŝtojn al pli da respekto por la civitano. La politiko retrovos sian veran celon: la feliĉon de la homoj.

H. CASTIAU

* *Où allons-nous?* - Roger Garaudy. Eld. Messidor, 1990.

*Interŝanĝe kontraŭ poŝtmarkoj de via lando (el la tuta mondo) franca filatelisto sendas 40/60 francajn PM-ojn.
Adreso: C. FOUCONNIER, 11 rue du 8 mai 1945,
F 80330 LONGUEAU*

trafe instrui...

(daŭrigo de L!101)

Sekvi iun rigoran gramatikan progreson ne tiom helpas por la akiro de la lingvo: certe ne de la komunika kapablo kaj eĉ ne, kiel ni vidis, de la kompreno. Ĉu tiom ĝenus la komprenon, se en frazoj plejparte kompreneblaj pro la situacio, la kunteksto, la intenco de la parolantoj, troviĝus kelkaj vortoj, strukturoj, dirmanieroj, kiujn la lernantoj ankoraŭ ne kapablas klarigi gramatike? Per la uzo ili klariĝas kaj fiksiĝas en la menso de la lernantoj, kiuj nur poste (sed tiam pli bone, pli funde, eĉ eble per si mem sen klarigoj) intelektu komprenos kaj analizos.

(Cetere la uzo de vera lingvo ene de difinita situacio multe helpas por ĝuste, intime, kompreni subtilajn gramatikajn punktojn: uzon de kio, kiu, tio, tiu, artikolo...) Estus tro longe detaligi nun ĉi tiun punkton, sed mi nur diru, ke ĝi ne estas detala: ĝi rilatas al profunda regado de la gramatiko je la servo de la esprim-bezonoj.

Mi ne diras, ke oni elektu hazarde iun ajn veran interparoladon kiel bazon de la instruado. Kompreneble oni komence zorge elektu materialon, kiu ne havu tro da malfacilaĵoj; sed la plej grava kriterio restas tamen, ke vera komunikado okazu.

Imagu gepatrojn, kiuj, por helpi sian infanon, alparolus lin nur per frazoj gramatike ĝustaj sed sensencaj kaj ĉefe sen intenco diri al li ion, nur por instrui al li, kiel oni parolas. La rezulto estus, ke li malbone komprenus (malgraŭ la simpleco de la frazoj), ke li havus la impreson esti stulta (kial diri al mi tion, kion mi ja scias; aŭ kial demandi ion, kion ili scias?) kaj krome, ke li konsiderus la lingvon vakua kaj havus neniun emon paroli.

Laŭ mia limigita kono, oni trovas ekzemplojn de vera komunikado en jeraj kurs-libro:

- Gerda malaperis - Claude Piron
- Jen nia mondo - J. Wells
- Ĉu vi parolas Esperante ? - A. Pettyn
- La Zagreba metodo

Tradiciaj libroj kiel "Cours rationnel d'Esperanto" respondas alian bezonon : fundan esploron de la gramatiko, kaj en tiu perspektivo ili havas valoran utilon ; sed oni vane serĉus en ili ekzemplojn de komunikado.

* * *

Kiel uzi dialogojn de lerno-libroj por naski komunik-situaciojn ene de klasĉambro ?

Eĉ taŭga interparolo ne multe helpas, se oni nur pasive kaj intelekte traktas ĝin.

Iu, kiu, intelekte lerninte gramatikajn regulojn kaj vortlistojn kaj nur tradukinte, troviĝas en vera situacio kaj ĉagrene konstatas, ke li/ŝi ne kapablas paroli, tiu estas komparebla al iu, kiu lerninte nur solfeĝon kaj aŭdinte muzikon, esperus jam kapabli ludi violonon.

Sed paroli lingvon, same kiel ludi muzik-instrumenton, ne estas nur intelekta procezo : ĝi supozigas longan antaŭan trejnadon kaj mobilizon de la tuta individuo : de la parolorganoj, de la mensco, de la memoro, de la emocioj, de la tuta korpo...

Kaj ĉar la akiro de lingvo ne estas nur intelekta procezo, la lernado ne povas baziĝi sur tradukado aŭ sur ekzercoj, kiuj laborigas nur la intelekton. La instruanto devas unue proponi ekzercojn, kiuj helpu profundan, intiman asimiladon (de la prononc-maniero, de la gramatiko, de la vortoj...); due, doni okazon reuzi la akiritajn nociojn pli kaj pli persone ĝis plene libera esprimiĝado, kio estas la fina celo.

Aŭ, pli simple dirite, la instruanto devas ne montri kiel funkcias la lingvo per vakuaj, nenion dirantaj ekzemploj, sed igi la lingvon vivi per la buŝo, la menso, la emocij, la tuta personeco de la lernantoj.

En tiu ĉi perspektivo, mi vidas tri eblajn etapojn :

1. Alproprigo de la necesaj vortoj kaj strukturoj por iu difinita komunika celo.

Tio povas jam okazi per etaj, simplaj interparoloj, kiujn la lernantoj ludu, simlante en la klasĉambro veran situacion. Tiel, ekde la komenco, la tuta personeco envolvigaĵas kaj la lingvo alproprigaĵas pli funde, pli intime.

Gravas ankaŭ la rilatoj, kiuj, per la ludado, tuĵ kreiĝas inter la lernantoj : ili ne plu estas unuforma unuo fronte al la instruisto, sed ja diversaj individuoj, kiuj interrilatas per nova, sed jam funkcia, ilo. Mimadoj, gestoj, esprimo de la voĉo... Ĉio estas tre grava, ĉar per tio la lingvo iĝas vivanta. Ĉiuj duopoj ludu laŭvice ĝis la dialogo efektiviĝu flue, nature, senhezite, sentime. Kaj iom post iom aldoniĝos pliaj elementoj kaj kreskos la elekt-ebleco de la lernantoj.

Ekzemple : mi elektas kiel bazon la komencon de la unua ĉapitro de Gerda malaperis.

Laŭ komunika vicpunkto, mia celo estas ke la lernantoj kapablu priskribi, karakterizi, difini iun por rekoni lin/ŝin inter pluraj aliaj . Mi proponas komence jenan interparolon.

(La du personoj konas unu la alian kaj troviĝas en publika loko).

- Saluton, Ann...
- Saluton, Kristin'.
- Diru al mi, kiu estas tiu ? (Mi montras sed malprecize)
- Kiu ?
- Tiu viro ! (Mi montras pli klare)
- Ha, tiu? Estas Gilles.

Rapide oni aldonas la eblecon elekti "tiu viro" aŭ "tiu virino" kaj do montri iun ajn personon ĉeestantan.

Poste oni aldonu pli precizan karakterizon :
ekzemple

tiu	alta	virino	kun	blondaj	haroj
	malalta	virino		nigraj	
	juna			rufaj	
	maljuna			longaj	
	mezaĝa			mallongaj	

(Oni prezentu la vortojn, kiuj estos bezonataj por karakterizi la diversajn ĉeestantojn.)

kaj tiel plu ĝis proksimume tio :

Ĉiuj substrekitaĵaj vortoj estas anstataŭigeblaj per aliaj, laŭ la esprimbezono.

- Saluton, Fred.
- Saluton, Mark.
- Diru al mi, kiu estas tiu ?
- Kiu ?
- Tiu juna virino kun longaj nigraj haroj.
- Kiu ?
- Tiu, kiu staras en la mezo.
- Ha, tiu ?
- Jes, tiu.
- Estas Jakelina.

Je tiu ĉi punkto, oni povas sinteze resumi kelkajn gramatikajn punktojn, kiujn verŝajne ĉiuj jam komprenis intuicie per la uzo.

En tiu ĉi kazo :

Kiu...? por demandi aŭ		ambaŭ adjektivoj : Kiu viro
Tiu... por montri.		Tiu viro
		aŭ proncoj : Kiu ?
		Tiu.
		Tiu, kiu...

2. Kompreno, asimilado kaj rolludado de la baza interparolado.

Post tiu intima alproprigo, oni povas aŭdigi la registritan dialogon (laŭ normala rapideco kaj kun esprimorika tono).

Per ripetado (almenaŭ 2 replikoj sensekvaj), oni celas asimili ne nur la vortojn sed ankaŭ la taŭgan prononcon kaj fraz-melodion.

La teatrigo de la interparolado konkludas tiun ĉi etapon.

3. Persona uzo de la akirita kapablo en mem elektita situacio.

Kompreneble, komence la lernantoj disponas malgrandan lingvan provizon kaj verŝajne restos proksime de la baza teksto.

Sed tamen ilia kreemo ofte surprizis min.

Mi citu du ekzemplojn.

Ili estis lernintaj per la sama maniero, kiun mi ĵus priskribis kiel sir prezenti kaj fari demandojn pri aliaj.

Kaj mi proponis (post eble 4 lecionoj), ke ili elpensu situacion, kiam du nekonatoj unuafoje renkontiĝas.

Jen du verketoj. En la unua, temas pri du eksterteranoj (la elektitaj voĉoj tuj bone komprenigis tion) :

- Saluton.
- Saluton.
- Kiu vi estas ?
- Mi estas Blip-blip. Kaj vi ?
- Mi estas Ĝovo.
- Bone, Ĝovo. Kie vi loĝas, Ĝovo?
- Mi loĝas sur la planedo Venuso. Kaj vi ?
- Mi loĝas sur la planedo Jupitero.
- Kaj kiujn lingvojn vi parolas ?
- Mi parolas la jupiteran lingvon, kaj la saturnan lingvon kaj Esperanton. Kaj vi ?
- Mi parolas la venusan lingvon kaj Esperanton. Mi pensas, ke ĉiuj planedoj devus paroli Esperanton, Blip-blip.
- Mi konsentas, Ĝovo. Sed sur la planedo Tero, ne ĉiuj parolas Esperanton. Ili parolas la hispanan, la francan, la anglan, la portugalan, la grekan, la svahilian ktp.
- Jes, jes, tre malfacilaj lingvoj!...

En la dua, temas pri du junulinoj : unu estas parol-ema, deziras krei kontakton, la alia restas fermita kaj ne volonte respondas :

- Saluton! (...)
- Mi estas Ann. (...)
- Kaj vi, kiu vi estas ?
- (...)
- Mi demandis, kiu vi estas ?
- Kristin!
- Mi estas usonanino. Kaj vi ?
- Germanino.
- Mi estas en Belgio por laborkampo. Ĉu ankaŭ vi loĝas en Belgio ?

- Momente jes.
- Kion vi faras tie ĉi ?
- Mi multe labcras. Mi estas tro laca por paroli.

Estis agraba surprizo, konstati kiel ili sukcesis per la malgranda lingva materialo, kiun ili disponis, krei originalajn skeĉojn, fakte utiligante preskaŭ ĉion. Mi ja konscias, ke versajne temis pri inteligentaj kaj kreivaj gejunuloj ; tamen mi ankaŭ emas pensi, ke la materialon ili povis reuzi, ĝuste ĉar temis pri vera lingvo kaj ĉar ili, tuj de la komenco, vidis Esperanton kiel esprimilon, komunikilon.

Kompreneble, mi ne diras, ke ĉar oni komunikas, oni ĉiam tuŝas elstare interesajn kaj instigajn temojn : peti panon, prezentiĝi, informiĝi pri ĉambro-numero en kongreso... estas tre modeste konkretaj agoj. Sed certe ili estas porde al pli profunda esprimiĝo de propraj ideoj, spertoj, vidpunktoj, de al vera, plena kaj persona utiligo de la lingvo-koroj. Kial ? Ĉar, ekde la komenco, oni konsideras la lernanton ne kiel malplenan vazon, kiun oni plenigu per lingvaĵoj senrilataj kun li, sed kiel individuon, kiu havas ion por diri kaj kiu povas, ere de situacioj plej diversaj, liveri pli kaj pli libere el siaj propraj ecoj.

Katrin'

Profitu la rabatitajn prezojn por akiri la poŝtkartan E-kalendaron 1993 de Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL - 2585 HW HAGO. Poŝtbank-ĝiro 162626, UEA-konto iein-q.

1 ekz.: 0,35 gd. - 3 : 1. - 10 : 3 - 50 : 13,50 - 100 : 25.

POLA RADIO disaŭdigas en E-o du elsendojn ĉiutage.

* Je la 13.30 h (laŭ universala tempo) = 15.30 h (laŭ la somera mez-eŭropa tempo) per la frekvencoj : 31,50 ; 41,18 ; 41,99 ; 49,22 200 m (= 9525, 7285, 7145, 6135, 6095, 1503 KHZ).

* Je la 20.30 h (laŭ la u.t.) = 22.30 (laŭ la s.m.e.t.) per la frekvencoj : 41,18 ; 41,99 ; 48,90 ; 49,22 ; 200 m (= 7285, 7145, 6135 6095, 1503 KHZ).

Ce la adreso de la redakcio oni povas mendi ampleksan, senpagan informilon pri la kadra semajna programo : Pola Radio, Esperanto-Redakcio, PL 00-950 Varsovio, Box 46, Pollando.

Informas : Remigiusz Grzela.

NIA DEBATO



KIEL PACIGI NIAJN URBEGOJN ?

Henri Castiau :

De kelka tempo, en urbegoj oni konstatas multajn ribelojn de la arabdevena junularo. La sociokonsciaj homoj ne rajtas turni la dorson al tiaj okazaĵoj, kiuj aperigas malbonan rilaton inter la enmigrintoj kaj la praloĝantoj.

Fakto estas la ĉeesto de tiuj enmigrintoj. Estas devo trovi solvojn, kiuj permesos al la tuta loĝantaro pace kaj kviete vivi, ĉiu laŭ sia kulturo kaj siaj konvinkoj. Plie, ĉiuj rajtas trovi la samajn eblojn disvolvi sian individuon.

Multnombraj estas la kaŭzoj de la hodiaŭa situacio. Citindaj estas : la malzorgo de la publikaj instancoj, kiuj multfoje preparis belajn planojn, sed neniam kuraĝis trudi ilin al siaj elektontoj; la sinteno de la policanoj, kiuj fojfoje tuŝetas la faŝismon; la enŝoviĝo de la drogsinjoroj en la araban junularon kun ĉiuj supozeblaj konsekvencoj; la konfuzeco de la islamaj junuloj kiuj unufanke kolizias en la familia rondo kontraŭ la tradiciaj moroj, kaj aliflanke kontraŭ la malakceptemo de la praloĝantoj. Fine, la rolo de la amaskomunikiloj en la ĝenerala kreskado de la perforto ne povas esti subtaksita. Resume elĉerpi la liston de la eblaj kaŭzoj ja ne estas la celo de tiu ĉi artikolo.

Garolo :

LOKAJ KAJ GLOBAJ PROBLEMOJ

La enkonduko de Henri Castiau al la 40a ĉenletero devigas min iom ŝanĝi la titolon, ĉar unu fojon plian prezentiĝas specifaj rezonoj el Eŭropo. Bedaŭrinde, mi, kiel foririnto el Eŭropo antaŭ preskaŭ 40 jaroj, jam kutimas al analizo de la okazaĵoj laŭ tutmonda skalo. Estas ankaŭ utile rememori, ke Eŭropo kun siaj kelkcentaj milionoj da homoj ne devus neglekti la pliajn miliardojn da... kaj vere kun ĉagreno mi eksciis pri la kongresa temo de UEA en Vieno: "Kiam falas muroj de miljaroj: komuna eŭropa domo". Mi tiom ŝatus aŭdi pri la komuna tutmonda (globa) domo! Ĝuste por loke solvi la globajn problemojn. Ŝajne la eŭropismo estas pli forta, eĉ se ĝi ne sukcesos pacigi la etnajn fanatikismojn... male eŭropismo akriĝas ilin.

Kiel pacigi niajn urbegojn?

Mi kategorie respondas, ke urbegoj ne estas pacigebaj pro la esenco de la propra konsisto de urbo (laŭdifine): granda homamasigo, kiu, pro sia denseco kaj la vivmaniero de ĝia kunpremita loĝantaro, perdis sian vilaĝan karakteron kaj la senperan kontakton kun la kamparo. Aliflanke, vilaĝo estas malvasta aro da domoj, kortoj ks., kies loĝantoj vivas precipe el la terkultivado. Ĉar, jes, en nia absurda mondo, la homoj sukcesas vivi el aliaj aferoj ol la terkultivado! La homoj kunpremiĝas por negoci, por spekulii, por ĝuadi, por ricevi rajtojn, servojn, jes ŝajnajn zorgojn de publikaj instancoj... ktp. ktp, sen paroli pri la cititaj fermiĝoj en moroj, kutimoj, tradicioj, lingvoj, religioj, rasaj kondutoj, ree ktp. Ĉu tiam vi pensas, ke povas regi paco, amo, frateco, toleremo? Kiaj subjektivaj belaj vortoj!

La nura solvo estas ĉesigi la absurdan migradon al tiuj urbegoj kaj reveni al la tero, al la kamparo, al la vilaĝa vivsistemo. Laŭ la homaj karakteroj mem ne povos prezentiĝi alia solvo... krom la konfliktoj, la fremdiĝo en la vivmedio, kun neŭrozoj, psikaj traumatoj, kiujn la moderna uzado de drogado pliakra-

Multaj rimedoj proponiĝis, de la plej ekstremaj ĝis la plej humanaj. Kelkaj sugestis la reiron al la devena lando. Ĉiu racia homo komprenas, ke tio ja ne estas konceptebla en landoj alligitaj al la homrajtoj. Aliaj vidis solvon en la disigo, en la akceptanta lando, de la enmigrintoj. Tiuj ĉi tamen, minimume dirite, ne montris entuziasmon por tia iniciato; ili timis la izolecon kaj la maleblecon aĉeti siajn kutimajn porvivaĵojn. Plie, la prezo de la loĝejoj ekster la malnovaj urbkvartaloj estis vera barilo al tiu disjeto; la integriado ne atingis la esperitajn rezultojn.

Kian vojon ni devos elekti? Belga ĵurnalisto, MANU RUYSS, kiu ĝuas en sia lando grandegan famon de sagaco, kuraĝas prezenti novan manieron ekstrakti tiun aĉan problemon.

Ĉu la islama komunumo devas perdi sian kulturon kaj malfideliĝi al sia religio? En Belgio, la islamismo estas unu el la oficialaj religioj: ĝi do havas la samajn rajtojn kiel la katolika, juda kaj protestanta, i.a. la rajton havi decajn moskeojn. Se nia konscienco malpermesas al ni forigi la islamanojn, ĝi devas nin ankaŭ instigi organizi por ili feliĉan socian kulturan vivon, per kiu ili retrovus sian identecon.

Manu Ruys konstatas ke, en Antverpeno, troviĝas juda komunumo. Tie loĝas, en la centro de la urbo, 15 000 animoj, kiuj sukcesas pace vivi, en siaj propraj sociaj aranĝoj, sendante siajn infanojn en judajn lernejojn, vizitante siajn sinagogojn, ktp. Ili havas malmultajn kontaktojn kun la aliaj loĝantoj, sed ĉio glate funkcias. Ĉu la islamanoj ne estas kapablaj respondece organizi tian komunuman vivon?

La urbegoj evoluas kun diversaj etnaj grupoj. Tio estas fakto. Ne estas reira vojo. Pli kaj pli, vole-nevole, ni devos lerni akcepti en niajn murojn homojn, kiuj povas mirigi nin, fojfoje eĉ ofendi niajn kutimojn. Rifuzsinteno malutilos al la kvieteco de niaj urbegoj.

Ĉu nia Majstro, Zamenhof, estus antaŭvidinta la nunan situacion? Fakto estas, ke li montris al ni, esperantistoj, la sekvendan vojon. Ĝi estas pavimita per amo, frateco kaj toleremo.


igas, kun senĉesa atencado de unu individuo al la alia kun rabŝtelado, ostagâgo, finfine ruiniĝo de la homaj kaj sociaj valoroj.

Castiau parolas pri urbegoj, pensante pri Antverpeno (470 000 loĝantoj). Ĉu la legantoj de "Laŭte" kapablas imagi urbegojn kiel Kairo, Delhio, Seulo, Ŝanhajo, Rio de Janeiro, Buenosajreso, kiuj en jaro 2000 enhavos pli ol 13 milionojn da homaĉoj? Kaj kion diri pri Meksiko kaj San Paŭlo, kie mi provas vivi, kiuj entenos pli ol 20 milionojn da! Ĉu eblas pacigiti homamasigon? Jen aberacioj kies ĥaoso estas nesolvebla. La solvo kuŝas en la returno al la kamparo post la absurda malracia migrado, kaj mi ne kapablas vidi alian.

La subjektiveco de etnaj valoroj

Estas en ĉi tiuj konfliktoj, ke revigliĝas la etnismoj kun religiaj, rasaj, moraj, tradiciaj fanatismoj propraj al tiu malsupera animalo, la homo. La naciismoj kaj ŝovinismoj kun elfluo de homa sango estas tute logikaj konsekvencoj. Kompreneble, estas facile konsci pri la absurda subjektiveco de tiuj etnaj valoroj se oni konsideras la ekvivalentecon kaj similecon de la esenco de la valoroj, kaj se oni konstatas, ke ĉiuj tiuj valoroj estas facile kunfandebaj kaj interplekteblaj kiel tio okazas feliĉe en multaj landoj, ekzemple Brazilio, Usono, Aŭstralio.

Por ni, esperplenaj esperantistoj, la faktoj devus esti des pli evidentaj, kvankam ni ofte ne kapablas preterpasi iajn internaciajn aŭ transnaciajn konceptojn pri nia mondo. La universaleco, la sennacieco de la homaj valoroj ne estas facile atingeblaj, kiam la homoj ne sukcesas plene uzi tiun kulturinstrumenton



kiu estas ĝuste Esperanto. La kolektado de poŝtmarkoj, la interkorespondado en la tuta mondo, la kongresumado, ja ne estas sufiĉaj por pensado super la loko kaj atingi la globon, la sennaciecan, tutmondan etnismon de la homa specio. Verdire tio devus esti la strebo de ĉiu kaj ĉiuj esperantistoj, tial Esperanto estas la kulturlingvo, kiun mi adoptis, cetere sen aparta pensado pri amo, frateco, paco k.a.! La vivado en ekvilibro en la natura vivmedio per si mem kondukas (aŭ kondukus) al la "pacigado" laŭ la plej ampleksa signifo... sed la homaj devojiĝoj de ĉi tiu lasta jarcento tion ne permesis, restas al ni la sufero de la konsekvencoj.

Nicole Déjean :

Unue, mi diras same kiel Garolo, ke urbegoj, kaj pli urĝe megaurbegoj, devus, devos malaperi, esti forigitaj.

Tiu homa aberacio, la mega-urboj, eĉ urbegoj, naskas neregeblajn problemojn, mizerojn diversaspektajn, respondecas pri endanĝeriĝo, malhumanigo de vivmedio.

Sed tion dirinte, kion ni faru por inversigi la nunan "kurenton", kion fari por solvi la plej akrajn problemojn? Ĉar ne sufiĉas malaprobi kaj denunci por ripari. Necesas kiel eble plej objekte trovi, analizi, kompreni la kialojn, kaj klopodi por agi je la plej modesta nivelo.

Fakte, ŝajnas al mi, ke temas pri problemoj, kiujn arigas, pligrandigas urbegoj kaj des pli mega-urbegoj :

- Elmigrado kaj enmigrado, integrado.
- Malriĉeco kaj mizero. Malekvilibro en ekonomia, socia disvolvado. Neegaleca socio, kiu pli kaj pli preterlasas homajn kategoriojn.
- Transpaŝo de la sojlo de toleremo, de elteno, kreskigas la agresemon, deliktojn, rasismojn, aperigas gettojn kun aĉaj vivkondiĉoj, domaĉaj kvartaloj, sanitariaj malfacilaĵoj, ktp...

Tiuj problemoj estas mondskalaj, same estos la solvoj trovotaj.

Mi ĵus legis en la aprila numero de la gazeto de Yves Cousteau "Calypso log", artikolon kies titolo estas : "Infero de mega-urbegoj". Jen kelkaj informoj : La gigantaj urboj senĉese kreskas. En la jaro 2000, 17 el ili entenos

pli ol 10 milionojn da loĝantoj kaj situos en landoj de la "Tria Mondo". (En 1960 nur Ŝanhajo entenis tiun kvanton). En la jaro 2000, Meksiko kaj San-Paŭlo entenos 25 milionojn da loĝantoj. En 2020, unuafoje en la homara historio, la urba loĝantaro estos pli multnombra ol la kampara. Nun, 600 milionoj da homoj vivas en nesanita kondiĉoj kaj 300 milionoj pliaj pluvivas en kondiĉoj de absoluta malriĉeco. La kialoj? La kreskanta demografio, la mizerego en kamparoj, kio estigas internajn migradojn de kamparanoj al urboj.

Post tiu artikolo, historiisto Claude Liauzu alportas klarigojn :

En Okcidento aŭ en la "riĉaj landoj", disvolvado de urboj estas unue konsekvencoj de industriigo kaj ekonomia kreskado. Sed en la "Tria Mondo" estas ĉefe rezulto de krizo, senvalorigado de kampara mondo, de tradicia socio. Strange, estas pli facile pluvivi en urboj ol en kamparoj pro politikaj sistemoj, kiuj sankcias la kamparanojn. Sed tiuj urbegoj en tiuj malriĉaj landoj estas veraj parazitaj.

Mi opinias, ke ankaŭ en Okcidentaj landoj oni senvalorigas, plu senvalorigas la kamparan mondon, la tradician socion. La modernaj ekonomiaj kalkuloj pli kaj pli malpliigas la nombron da terkulturistoj. La internaciaj produktoj, interŝanĝoj, estas tiel starigitaj, ke ili profitdonas al minoritato kaj malfirmigas vivkondiĉojn de multaj homoj. Vilaĝoj mortas, en mezgrandaj urboj mankas publikaj servoj, oficoj, (ekz. liceoj, hospitaloj). En Francio estas protestoj, rifuzoj, kiam la ŝtato volas transloki el Parizo al provincoj altlernejojn, oficejojn...

Ankaŭ Claude Liauzu opinias, ke la solvoj estas mondskalaj kaj dependaj de la transformiĝo de la plej influaj ŝtatoj, dependaj de solidareco inter socioj riĉaj kaj malriĉaj.

Same kiel Garolo, mi diras, ke necesas solidareco inter homoj, konsciiĝo de la universaleco de la homa specio, de la neceseco ĝin savi, savante ĝian medion. Ĉiu bonvolema homo povas eĉ individue, per siaj propraj rimedoj, agi rekter.

J.G.:

La problemo de la malakcepto de la enmigrintoj en niaj landoj ne estas nova, ĉar jam en libro aperinta en 1938, "**Tri milionoj da eksterlandanoj en Francio**", kaj verkita de ĵurnalisto el la serioza gazeto "Le Temps" ("La Tempo") estis skribite : "Nia popolo komencas konsideri kun malfido dum tiuj tagoj de ekonomia krizo tiajn kategoriojn de eksterlandanoj neasimileblaj, kiuj vivas, edziĝas inter sama gento, havas sian religion, siajn pastrojn, siajn gazetojn, siajn morojn, sed postulas kaj ofte ricevas la helpon por la senlaboruloj. Alia fakulo en 1935 (universitata tezo) parolis pri "la Hispanoj, kiuj en kvartalo ĉirkaŭ Liono loĝas en malordaj kaj malpuraj domoj karakterizaj de la sudaj rasoj kaj eĉ kuiradas surstrate". En kriza periodo oni ĉiam trovas la "pekportan kapron", kialon de ĉiuj malbonaĵoj.

Sed en la nuna periodo la situacio pliakriĝas, ĉar la aspektoj de la socio komplete ŝanĝiĝas. En niaj "disvolvataj" landoj senlaboreco kreskas pro robotiko, produktiveco, konkurado... sen solvo en la nuna sistemo. La laboro por ĉiuj dum la tuta aktiva vivo estas por ĉiam finita! Sed en nia duala socio pli kaj pli da homoj estas ekskludataj de la normala vivo, forpelitaj al la plej malriĉaj kvartaloj ĉirkaŭ la grandaj urboj; la gejunuloj enmigrintaj, sed ne nur ili, estas senlaboraj kaj ĉefe sen estonta celo. Sufiĉas fajrero kaj ĉio eksplodas! Vidu tion ĵus okazintan en Los-Anĝeleso!

La antaŭvidoj de la fakuloj estas pesimismaj : en la Tria Mondo la demografia kreskado kaj la deviga forlaso de la kamparo pro la malaltaj prezoj de la krudaj materialoj fiksataj ĉe la borsoj de valoroj en Londono aŭ Ĉikago, la manko de kultivebla grundo (agrara reformo ĉiam promesita, neniam plenumita), en Sud-Ameriko, ekzemple, la forigo de la arbaroj, la poluado de la akvo, la progreso de la dezertigo, ktp., ŝajne kondukas al "netolerebla mondo", kiel diras René Dumont.

Laŭ raporto de "Fonduso de UNO por la landancro", 83% de la demografia kreskado dum la dek venontaj jaroj estos en urboj. Necesus de nun ĝis la jaro 2000

konstrui por tiuj novaj loĝantoj dek novajn urbojn kompareblajn kun New-Delhi kun nesolveblaj problemoj pri malriĉeco kaj vivkondiĉoj. Terura estonteco, se nenio estos farata por draste ŝanĝi la situacion!

La demografio estas ekbremata en kelkaj landoj, kie la virinoj estas alfabetigitaj : tie la procento de la naskoj por ĉiu virino malaltiĝis de 6% ĝis 2%. Malgranda espero!

Mi ne kredas, ke oni povas esperi amasan reiron al la kamparo. Urbaniĝo ŝajnas malmulte returnebla. La Komuna Agrokultura Plano en la Eŭropa Komunumo antaŭvidas la forigon de la duono de la nunaj kamparanoj, anstataŭotaj de industriaj farmbieno, kiu produktos intense, kaj la cetera grundo fariĝos senkultura por la turismo. Ekolo-kamparanoj provas bremsi tiun "evoluo" jam komencitan. Ni esperu, ke oni aŭskultos ilin.

Mi opinias, ke ankoraŭ eblas iom pacigi niajn ankoraŭ ne tro grandajn urbojn, sed necesus tute alia koncepto pri ekonomiaj kaj politikaj strukturoj, haltigi la frenezan konkuradon, kiu "lasas sur la tapiŝo" pli kaj pli da forĵetaĵoj de la socio, doni al ĉiu loĝanto decajn vivkondiĉojn, peti la vidpunkton de la loĝantoj antaŭ ol decidi ion ajn. Agresemo ofte enradikiĝas sur miskompreno, timo de la alia pro haŭtkoloro, malsamaj kutimoj ktp. Fanatikeco religia aŭ naciisma kreskas sur grundo preparita per malbonaj vivkondiĉoj de la homoj aŭ tro longa premo de la popoloj (Alĝerio, orienteŭropaj landoj).

Edmund GRIMLEY EVANS :

Al Henri Castiau koncernas la situacio de la araba junularo en francaj urboj. Kompreneble, tio estas speciale franca problemoj, ĉar enmigrintoj el Morda Afriko ne alveris tiom amase al la landoj, kiu mi plej bone konas : Britujo kaj Germanujo. Ĉiu eŭropa lando havis ĝis nun sian propran specon



de enmigrintoj (en Germanujo Turkoj kaj Jugoslavo, en Britujo hindodevenaj homoj el diversaj mondopartoj, ktp). Oni demandas sin, kio okazos en unuiginta Eŭropo, ĉu estontecaj migrantoj alvenos en ĉiuj landoj, aŭ ĉu oni konstruos fremdul-imunan fortikaĵan Eŭropon, en kiu ĉiu lando pravigas la forsendadon de azilpetantoj per la rifuzemo de siaj najbaroj...

Mi ne sciis, ke en Belgujo Islamo estas unu el la oficialaj religioj, sed mi forte oponus tian oficialigon en aliaj eŭropaj landoj. En Britujo oni multe parolis pri tia oficialigo dum la librobrola epoko de la "Satanaj versoj". Islamanoj bone argumentis, ke se Kristanismo ĝuas en Britujo laŭstatutan protekton en la formo de leĝo kontraŭ blasfemado (de Kristanismo), tiam ankaŭ Islamo meritas tian protekton. Ili pravus, ke la situacio estas maljusta, sed ili malpravus pri la justa solvo. Pli bone estus nuligi la leĝon kontraŭ blasfemado kaj maloficialigi Kristanisman. Britujo havu nenian ŝtatan religion!

Mi jam vizitis Antverpenon kaj vidis la tiean judan komunumon, kaj mi devas atentigi, ke la paco priskribita en "Manu Ruys" laŭ mia observado estas paco tre malstabila. Dum mi promenis tra la juda kvartalo kun belga amikino, mi rimarkis, ke ĉe ĉiu stratangulo staras grupo de armitaj policistoj. Demandite pri la kialo, ŝi klarigis, ke nur en la lasta semajno okazis du bombatakoj kontraŭ la Judoj. Tiam ŝi komencis priskribi, kiom aĉaj estas tiuj fiaj Judoj, kaj kiom ilin malamas la plej multaj urbanoj. Se okazus ia interna milito en Belgujo, aŭ ia periodo de senleĝeco, oni povas bone imagi, kio tie okazus...

Sed mi pasigis nur unu nokton en Antverpeno ; iu, kiu pli bone konas la urbon, raportu pri la situacio tie!

La problemaro tuŝita de Henri Castiau estas la konata problemoj de multkultureco kaj unukultureco. Mi mem inklinas al subteno de multkultureco, sed mi ja konscias pri la multaj problemoj de tiu elekto. Se socio estas displitita en diversajn kulturajn grupojn vivantajn sendepende, ĉiu paco estas paco malstabila, dumtempa. Kiam venos ia provoko, ia epoko de ekonomiaj problemoj kaj akraj konfliktoj, tiam ekflamos denove la malamo kaj perforto inter la grupoj. Necesas havi ian ligilon inter la grupoj, ian komunan kulturon por transponti la diferencojn. Je monda nivelo necesas Esperanto, por ke la etnoj ne ĉiam interbatalu, sed je landa nivelo povas funkcii iu alia.

Situacio, en kiu la enmigrintoj "havas malmultajn kontaktojn

kun la aliaj loĝantoj", estas eksplodema. La proponantoj de multkultura socio bone atentu la neceson de interkultura edukado certiganta la reciprokajn komprenon kaj komprenemon!

Tereza :

Mia opinie, se ne ekzistus hom- kaj varespluatadoj de longe tra la mondo, la situacio estus pli klara. De ĉiam la homoj el ĉiuj landoj adaptiĝis al ĉirkaŭaĵoj, trovante ideojn por sin nutri kaj vivi eĉ malgraŭ klimatakcidentoj.

Sed homoj vojaĝis, alvenis en malkovritajn landojn kaj uzis la varojn, kiuj ne plu estos poste por la enlandanoj. Tiam mizero forpuŝis certajn homojn for de ilia lando.

Kiam la elektita lando prosperas, la loĝantoj bezonas laboristojn, precipe por la taskoj, kiujn ili ne ŝatas fari. Ili konsentas akcepti tiujn enmigrantojn. Tamen oni lasas ilin en pli aĉaj kvartaloj ĝenerale.

Sed kiam poste la sumo de la homfiaskado faras, ke laboro mankas por certaj, la erloĝantoj sin turnas al la enmigrintoj por kulpigi ilin pri ĉiu aĉaĵo. Samtempe politikistaĉoj uzas la timon de la erloĝantoj kaj pliigas la aĉajn sentojn de la homoj anstataŭ helpi ilin konatiĝi kaj kompreni la situacion pro kio ĉiu suferas en koncentrejoj loĝejoj. Oftas ankaŭ la religioj, kiuj skribas pri homamo kaj male raskas militojn nome de "Dio".

Kion fari? Laŭ mi, eĉ en familio, se la vivkondiĉoj estas malbonaj, se ĉiu ne havas eblecon sin ŝirmi for de la najbarbruo, la vivo ne estas eltenebla. Se mono mankas, se la ventroj estas malplenaj, ĉiuj akras kaj baldaŭ batalas inter si.

Do, necesas ke la homoj havu decan loĝejon, ke la najbareco ne estu fonto de ĉikano, ke la homoj havu nutran laboron, ke oni donu al ili edukon kaj preparadon al paca vivo. Ankaŭ la gazetoj informu vere, puŝante la homojn al pli da komprenemo kaj helpemo kaj amo.

Televideo, kiu invadas la hejmojn, povus alporti taŭgajn bildojn instruplenajn pri toleremo. Estas multe da mono por instigi la homojn al konsumado. Oni prenu procenton por tion fari.

En apuda urbeto de sveda urbo Gotenburgo ĉiu enmigranta familio estas akceptita de enloĝanta familio por plifaciligi ĝian novan vivon... Eta sed bela ekzemplo, ĉu ne?

Kaj por ni esperantistoj, se sama lingvo neniam forpuŝis malamon, oni tamen opinias, ke sama lingvo kiel esperanto helpus la homojn rezisti al informaĉoj inter la landoj. Sed tio ne sufiĉus, ĉar estas devige, ke oni prezentu ne nur militinformojn sed pozitivajn ekzemplojn de homaj agadoj por redoni al la homoj esperon kaj sekvidan vojon.

GBEGLO Koffi :

Kiel paciĝi niajn urbegojn? Tio estas la titolo de la ĉenletero. Nu! Kiuj paciĝu la urbegojn? Ĉu la publikaj instancoj? Ĉu la praloĝantoj? Ĉu la arabdevena junularo? La artikolo de Henri Castiau parolas pri ribelo de la arabdevena junularo, provante enhavi ankaŭ la kaŭzojn de la fenomeno, kaj la vojon por paciĝi la etoson.

Miaj unuaj demandoj estus : "Ĉu nur la arabdevena junularo ribelas en la urbegoj? Ĉu ilia malribelo paciĝos la urbegojn? Mi tuj parolos, kvazaŭ tiujn demandojn oni respondus per "JES".

Necesas do kunsidi kun la arabdevena junularo por esplori la aferon. Oni devas aŭdi ilin kaj klopodi ilin kompreni. Ilin komprenigi pri multaj aferoj estu alia paŝo. Misinformadoj, onidiroj, ktp, povus naski tiajn problemojn. Kiam publikaj instancoj sukcesos sidi ĉe la sama tablo kun la islama junularo por interkonsente trovi solvon al la problemo, tiam aperos la fareblaj/farindaj/farendaj paŝoj, kiuj kontribuos al la paciĝo de la etoso. Nu, ĉu tiu kunsido povus ebligi?

Jam delonge mi rimarkas, ke la blankuloj estas konsiderataj kiel superhomoj. Tial, eĉ en niaj afrikaj landoj, ili estas tre respektataj. Kiam ekz. homoj vicatendas antaŭ la perdo de kuracisto por esti ekzamenitaj unu post la alia, la blankulo malfrue alvenanta, neniam volas resti malantaŭe, li rekte eniras la fakon de la kuracisto. Ni imagu : nigrulo tiel kondutu, kaj la kuracisto ŝovus lin eksteren. Jes, eĉ en niaj landoj blankuloj estas reĝoj, ili subpremas nin ; kia estus la situacio, kiam ni fariĝus ENMIGRINTOJ en la lando mem de la reĝoj? Ĉu tiuj superuloj akceptus sidi ĉe sama tablo kun siaj mal-

Ŝatatoj, la arabdevenaj junuloj? S-ro Jacques CHIRAC, eks-ĉefministro de Francio, jam insultas afrikanojn, ke ili malbonodoras. Ĉu tia kunsido povus vere ebligi?

Kiam la homoj komprenos, ke ĉiu homo estas homo, kaj nenio pli aŭ malpli, tiam tiaj subpremado, subestimado ĉesos kune kun siaj konsekvencoj (ekz. ribelo de la arabdevena junularo), kaj nur tiam ĉiuj homoj, kiaj ajn estas iliaj devenoj, estos devigataj vivi kune, kaj ĝuste tiam la belga ĵurnalisto Manu RUYSS havos vere grandan famon de sagaco, ĉar tiam li komprenos, ke la apartigo de judoj en komunumo estas malhumana, kaj tiaj apartigoj en pliaj komunumoj, veraj atencoj kontraŭ la homa digno, neniel estas vojo por pacigi la urbegojn.

Nun la pilko saltetas en la kampo de la praloĝantoj. Al ili apartenas la tasko mildigi la ribelon. La aserto, kian faris lia moŝto eks-ĉefministro CHIRAC, ke nigruloj malbone odoras, estas vere ribeliga. Mi ne scias, ĉu nur li tion perceptas per sia longega nazego. Juĝu mem! Ĉu tiaj diroj pri samhomoj decas?

Nia Esperanto, se ĝi povos iam akceptiĝi kun sia interna ideo, faciligos la taskon al ni, ĉar, kiel asertas s-ro Henri CASTIAU, nia majstro ZAMENHOF montris al ni la sekvendan vojon, pavimitan per amo, frateco kaj toleremo.

"Nia Esperanto". Jes ja, Esperanto estas ĉies propraĵo, kaj ĉiu homo libere ĝin lernas, dum al franca de CHIRAC, la angla de SEKSPIRO, ktp, estas altrudataj al ni. Krome, tiuj lingvoj estas iloj, per kiuj la potenculoj sklavigas, ekspluatas nin. Imagu mem la reagon de risorto, kiu, delonge premita, finfine trovas libereton! Paf : eksplodo.

Nia debato

Suzanne :

Henri Castiau bonege elmontris la situacion ; mi konsentas kun li. De dudek jaroj, en mia urbet-vilaĝo, loĝas Nord-Afrikanoj. Ĝenerale ili bone rilatas kun la aliaj loĝantoj - ĉefe kun siaj samlaboruloj. La gejunuloj bone rilatas kun samaĝuloj. La virinoj - tiuj, kiuj ne laboras - plej ofte rilatas inter si. Estas virinoj kvardekjaraj, kiuj stiras aŭtojn kaj sin vestas laŭmode. Koncerne la junulinojn : ĝus okazis edziĝofesto ; mi rimarkis plurajn junulinojn, kiuj surmetis vestojn ege mallongajn, meze de la femuro. Pri la islama religio, mi supozas, ke ili ĝin ne priatentas.

Ja, ekstremdekstruloj, dekstruloj, okaze malestime alparolas ilin, sed ĝenerale, laŭ mi, ili estas tolerataj. Kiam okazas funebro, la najbaroj subskribas la funebbran kajeron. Mi tion faris. Kelkajn tagojn post la funebraĵoj, mi ricevis dankanoncleteron.

En urbegoj multnombrajn malfacilaĵojn, travivaĵojn, la enmigrintoj eltenu!

Iam, ĉe la komenco, mi havis la okazon montri simpatian al iuj el ili. Nun mi rimarkas, ke ĉiuj amike salutas min, eĉ tiuj kun kiuj mi neniam rilatis.

Fakte, en urbegoj, la agadaĉoj kontraŭ ili fare de urbestroj - ĉefe en Parizo - pro monavido, por ke "ilia" urbego fariĝu prestiĝa "montrofenestro" (parenteze, ili senvivigas ĝin) forpelas ilin eksteren, el ilia loĝejo : aĉa perfortaĵo!

Mi opinias, ke la plej bona solvo estas unuiĝo, miksidevena loĝantaro.

Kulpas pri la kreskado de tia malamo kontraŭ la enmigrintoj - kiujn oni venigis en Francion, celante havi ne postulemajn laboristojn koncerne la salajron - la politikaĉuloj, la amaskomunikiloj, kiuj montras la faktojn pli sensaciaj ol ili estas. Ekzemple, antaŭ nelonge, trinkejestro, pro tute malgrava fakto, pafis al dektrijara knabo. Ĉar tio okazis en ĉirkaŭurbo, la anoncisto, tuj ĉe la komenco, diris : "...ankoraŭ plian fojon, ribelo en ĉirkaŭurbo...". Koncerne la naskiĝon de Nacia Fronto, ekde la komenco oni gurdadis dirojn de Le Pen. Iom post iom tio naskis NF ; sed en tiu okazo, tio estis politika manovro.

Izoleco

*Se vi impertinentas sen bonaj rilatoj
kiel infano, oni metas vin en infanhejmon.
Vi ja ne estu impertinenta sen bonaj rilatoj.
Tiuĵ, kiuj ne devas impertinenti, ĉar ili havas
bonajn rilatojn, unuiĝis en la batalo kontraŭ
la impertinentaj, kiuj ne havas bonajn rilatojn.
En komisiono ili decidis :
Vi impertinentas kaj oni devas meti vin en infanhejmon
(se vi estas sen bonaj rilatoj).*

*Se vi oldas sen subteno,
eĉ la oldulhejmo ne certas por vi.
Vi ja ne estu olda kaj sen subteno.
Tiuĵ, kiuj ne oldas, ĉar ili havas subtenon,
unuiĝis en la batalo kontraŭ la oldaj,
kiuj estas sen subteno.
En komisiono ili decidis :
Vi oldas kaj necesas meti en oldulhejmon vin
(se vi estas sen subteno, kaj se tio eblas).*

*Se vi estas izolita kaj sen privilegioj,
vi baldaŭ furiozos.
Sed vi ja ne furiozu sen privilegioj.
Tiuĵ, kiuj ne furiozas, ĉar ili havas privilegiojn,
unuiĝis en la batalo kontraŭ la furiozuloj,
kiuj ne havas privilegiojn.
En komisiono ili decidis :
Vi furiozas kaj oni devas meti en izolon vin
(se vi ne havas privilegiojn).*

Hagen Hirte



Okdek jaroj (sekvo)

Dum mia okdekjara lernado kaj praktikado de Esperanto mi akiris kelkajn ideojn. Mi prezentas ilin ne kiel profesorajn instruojn - Dio gardu! - sed kiel personajn opiniojn pripensindajn kaj diskutendajn. Tion mi faris antaŭ kelka tempo pri uzado de la pronomo **CI**, kaj mi ricevis kelkajn respondojn aŭ aprobajn aŭ malaprobajn.

Hodiaŭ mi traktos pri neologismoj. Unua demando : ĉu sisteme forĵeti ĉiujn neologismojn? Tiaokaze ni kondamnis nian Majstron, ĉar Zamenhof estis unua kaj granda iniciatinto de neologismoj. En liaj verkoj estas sufiĉe multaj vortoj ne troveblaj en la Universala Vortaro de Esperanto de la Fundamento. Nu, ni scias, ke li neniam ion skribis sen matura pripenso. Serioze esplorante liajn skribaĵojn, oni devas rekoni, ke li estis prava. Do la demando ne estas : ĉu neniam da neologismoj, sed : kiom, ĉu multe aŭ malmulte ? Mi distingos inter du kampoj : poezio kaj prozo.

Al poetoj mi permesus uzi tiom da neologismoj, kiom ili trovas necese por arte esprimi siajn pensojn kaj sentojn.


En prozo mi estus pli singardema. Rifuzi tre multajn neologismojn kondukus al longaj derivaĵoj aŭ kunmetaĵoj kun abundo da afiksoj, kiuj oni devus deĉifri kiel rebusojn. Troa abundo da neologismoj ne pliriĉigus la lingvotrezoron, sed ĝin supersarĝus per superflua balasto. La prudento kredeble sidas en ĝusta mezo. Ekzemplon donis al ni nia granda vortaristo Grosjean-Maupin. En siaj esperanto-francaj vortaroj kaj en P.V. li akceptis sufiĉe multajn neologismojn. Prave, ĉar esperantisto, kiu en legata teksto renkontas iun de li nekonatan vorton, bezonas trovi ĝian signifon en sia vortaro. En siaj franc-esperantaj vortaroj li estis

multe pli avara pri neologismoj. Tre ofte, esplorinte la ekzaktan signifon de franca vorto, li tradukis ĝin per derivita aŭ karnelita vorto el pure fundamentaj elementoj. Nur tiam, kiam tiu procedo laŭ la esperanta vortkonstruo kondukus al tro komplikaj rezultoj, li akceptis neologismon. Li mem miascie proponis nur du : **gemuta** el la germana lingvo kaj **saudado** el la portugala, kaj li detale kaj precize difinis la signifon de tiuj vortoj.

Mi ne pretendas kompari min kun nia majstro-vortaristo, sed mi imitis lin, kiam mi iniciatis la neologismon **gadzarto**. Gadzarto estas lernanto aŭ lerninto en inĝeniera lernejo pri Artoj kaj Metioj. Ne temas pri belartoj, sed pri la artoj prilabori krudajn materiojn por fabriki objektojn kaj konstrui maŝinojn. La "Nacia Supera Lernejo pri Artoj kaj Metioj" konsistas el pluraj centroj : Châlons, Angers, Aix...kc. Mi fariĝis gadzarto per konkurso en j. 1918, kaj ricevis la breveton de inĝeniero en j. 1921. En la diversaj centroj la lernantoj ricevas saman instruadon intelektan kaj manlaboran. Ili ricevas ankaŭ saman spiriton konkretigatan per samaj tradicioj, kaj resumitan en ilia komuna devizo : frateco. Unu el miaj pli aĝaj kamaradoj el la centro de Angers (mi estas el tiu de Aix) interpretis tion per jena trafa esprimo : ni suĉis la saman lakton de gadzartoj.

Mi finis mian karieron per emeritiĝo en j. 1965. De tiam mi forgesis multon el miaj inĝenieraj scioj kaj spertoj, cetere preterpasitaj de la modernaj teknikoj : elektroniko, cibernetiko, informadiko. Mi ne estus kapabla diskuti kun juna inĝeniero. Sed mi daŭre sentas min gadzarto per la solidarsento, kiu min ligas kun ĉiuj generacioj.

Por esprimi ĉion ĉi mi ne trovis vorton en la esperanta vorttrezoro, do mi estis devigita uzi neologismon ĉerpitan ne el la franca lingvo, sed el teknikstudenta slango, cetere konata de sufiĉe multaj franclingvanoj. Ĝi certe ne havos vastan uzadon, sed en sia aparta fako ĝi ŝajnas al mi nemalhavebla.



EL MIA GALERIO DE PORTRETOJ

I. Mia kuzo Fernando

Li estis proksima kuzo de Ivona : lia patrino estis fratino de ŝia patro. Malpli proksima parenco de mi : du el niaj respektivaj praaŭvoj estis fratoj. Dek jarojn pli aĝa, li estis de ni ambaŭ tre amata, kaj reciproke. Li estis forta, vigla, lerta, gaja.

En aŭgusto 1914, ĵus fininte sian trijaran militistan servon, li estis mobilizita kaj sendita al fronto. En la unua batalo en Loreno, lia regimento perdis multajn soldatojn kaj oficirojn, inkluzive la kolonelon. Poste Fernando partoprenis en pluraj bataloj en belga Flandrio, en Ĉampanio, kaj en la giganta batalo pro Verduno, kie pereis tiom da germanoj kaj francoj. En trijara kampanjo neniam li estis vundita. Ŝajnis kvazaŭ la morto lin domaĝus.

Ni havas en Florako grandformatan fotoportreton kun bela kadro. Li staras en sia tuta staturo, kiu estis alta, firma sur ambaŭ piedoj, rekta en sia helblua kampanja uniformo. Li aspektas tre sana, fortika, nevundebla, nevenkebla. Ĉe la supra rando de la foto, dekstre pendas la insignoj de liaj du ordenoj : milita kruco kaj militista medalo.

Ni havas ankaŭ alian foton de malgranda formato. Li kun iom kreskinta barbo staras en tranĉeo inter du kamaradoj. Li skribis krajone : "trois durs à cuire". Mi tradukas proksimume tiun francan idiotismon, cetere facile interpreteblan : Tri malfacile kuireblaj. Ho ve!

En aŭgusto 1917 li estis postenigita kiel serĝento-poŝtisto. Lia ofico : transportadi korespondaĵojn inter la centra stabo en Verduno kaj pluraj komandpostenoj de divizioj, do sufiĉe malproksime de la frontlinio. Por tiu tasko li havis helpanton, kaj ili disponis ĉevalveturilon.

Ni ĝojis ekscii, ke li estas eltirita el la infero de la tranĉeoj, kaj ĝuas ekzistadon pli komfortan kaj, laŭ nia kredo, malpli danĝera. Sed la morto gvatis. Ĝi trafis lin en Verduno, en la urbo mem. Obuseksplodo en unu sekundo frakasis la veturilon, mortigis la du veturantojn kaj la ĉevalon. Sola relativa konsolo : la morto estis subita, li ne havis tempon por suferi.

En 1921, estante soldato en Versajlo, mi iun dimanĉon trajne veturis de Parizo al Verduno kaj piediris al militista tombejo. Vasta ebena kvadrato el nuda tero surplantita de

miloj da lignokrucoj vicigitaj laŭ longaj paralelaj linioj. Mi tujs trovis la unan kiu staris ĉe la unue renkontita angulo. Mi legis sur la kruco :

CLAVEL Fernand
serĝento

142a Infanteria Regimento
23an de septembro 1917

Li estis ĝuste 27-jara. Ĉirkaŭ la tombejo estis restoj de iamaj arbaroj : trunkoj stumpigitaj de longedaŭra intensa kanonado. Super ĉio plumbe griza nuba ĉielo. Neniu homo, neniu birdo, nenia bruo. En tiu vea pejzaĝo regis prema morta silento.

Mi restis tie longan tempon preskaŭ senkonscia. Subite la krepusko memoriĝis, ke mi devas reveturi al Parizo. Mi kuris al la stacio, kie jam estis la lasta trajno al Parizo. Ĝi jam ekmoviĝis, kiam mi saltis en vagonon.

Kelkan tempon poste, la gepatroj faris longan fervojan vojaĝon de Mendo al Verduno. Ili elfosigis la ĉerkon, kaj venis kun ĝi al Florako, kie ĝi nun kuŝas en la familia tombo kun la mencio : mortinta pro Francio.


En 1940, kiam Francio estis denove invadata, la malfeliĉaj gepatroj povis mezuri, kiom vana kaj vanta estis la ofero de ilia unika filo. La patro mortis fine de 1942, kiam la tuta franca teritorio estis okupata de la germana armeo. La patrino vivis kelkajn jarojn plu. Do ŝi estis informita siatempe pri la dua venko de Francio. Sed kion signifas venko por dolora nekonsolebla patrino ?

En 1923 mi vidis en rejnlanda kamparlando grandformatan fotoportreton de juna leŭtenanto en grizverda kampanja uniformo kun fera kruco sur la brusto. Mortigita ĉe Verduno en 1917, eble la saman tagon kiel Fernando.

Nun germanoj kaj francoj estas amikoj. Por atingi tiun feliĉan finon, ĉu vere necesis la vivofero de Fernando kaj de milionoj da aliaj senkulpaj viktimoj francaj, germanaj kaj ceteraj ?

Milito, abomeninda stultaĉaĵo !

VALO



PRI LA REVOLUCIO DE 1789-a

La Revolucio de j. 1789-a havas tri grandajn kaŭzojn.

1. IDEOLOGIAJ KAŬZOJ

La "filozofoj" de la XVIII-a jc. estis adoptintaj la teoriajn ideojn de ROUSSEAU (Ruso) pri la "bona sovaĝulo", kiun koruptas nur la socio. Se oni detruus do ĉiajn sociajn trudojn kaj malegalojn, la liberigita egaligita homo fariĝus bona kaj frateca : li strebus nur al la komuna bono.

Tiuj teorioj infektis la simplan popolon, kaj speciale la urbanarojn, kiuj kredis al pli bona vivo, sed ankaŭ multajn nobelojn, kiuj pro la politiko de Ludoviko la XIV-a perdis aŭ forgesis sian rolon de peranto aŭ protektanto inter la reĝa povo kaj la regatoj. Multaj konsciis senutiliĝon ; pro tio, plej multe ne rezistis al la Revolucio, kaj eĉ foje aniĝis al ĝiaj ideoj. Male, la kamparanoj ĝenerale ne aniĝis al la Revolucio : ofte okazis konfliktoj inter farmistoj kaj proprietuloj kiuj ofte estis ne nobeloj, sed burĝoj.

2. MATERIAJ KAŬZOJ

La grandskalaj entreprenoj ne estis kreitaj far privataj entreprenistoj kiel en Britujo, kiu jam praktikis liberalismon, sed ekde Henriko la IV-a kaj ĉefe dum Ludoviko la XIV-a kaj COLBERT (Kolber), far la impulso de la reĝa regado (Gobelinaj murtpiŝoj, Sèvres-porcelanfarejo, spegulfarejo apud Cherbourg, vitrejo en St Cloud kaj poste en Le Creusot, ktp). Nobeloj interesiĝis pri la novaj industrioj, Ludoviko la XV-a starigis Markizon de LA TOUR D'AUVERGNE por estri la forĝeĝejojn de Gueugnon ; en 1757-a la dukoj de Croy, de Charost, de Chaulnes kreis la perakcian kompanion de ANZIN-minejoj ; la unua ferfornego estis konstruita en 1787-a far brita teknikisto en Le Creusot ; Jacques Perrier starigis en 1781-a pumpilojn movatajn per vapormaŝinoj por pumpi akvon el Seine por provizi Parizon.

Ĉiuj tiuj estroj de grandaj industriaj entreprenoj puŝis kompreneble al forigo de ĉiuj malhelpoj kaj katenigaj kutimoj. El ili estis multe pli da nobeloj ol da "burĝoj", kiuj tiam preferis akiri farmajn bienojn malpli riskodonajn.

3. FINANCAJ KAŬZOJ

Tiuj, kvankam ĝenerale neglektitaj, estis certe la plej gravaj : ili tiris post si ĉiujn konsekvencojn.

La reĝoregaj impostoj estis ĉiam tre malbonfamaj. Ili estis ĝenaj, kaj tre malegale disŝutitaj ĉar la ordenoj nobelaj kaj religiaj ilin ne pagis : ekleziuloj estis kvazaŭ ŝtatoficistoj, kiuj pagis sin mem per specialaj impostoj, nobeloj ne pagis kompanse al ties militserva devo, dum mezepoko ili prenis impostojn de siaj subuloj kompanse pro ilia protekto : la protekto kuntiriĝis, ankaŭ la ĉi-priaj impostoj.

Urbanoj kaj kamparanoj pagis tre malvolonte ; tiam oni estis taksita laŭaspekte, do ĉiu montris sin ankoraŭ pli malriĉa ol la realo ; oni ne emis al progreso, kontraŭe, ĉar oni aspektus pli prospera ol la najbaro... Fine, la impostoj tre malbone kaj malakurate alvenis en la reĝan kason. Ĉiu buĝeto cetere ne antaŭkalkulita, estis deficitita ; la reĝoj ĉiam devis pruntepreni ĉe la bankistoj : la reĝa regado estis daŭra bankroto.

La "parlamentanoj" (tute malsama signifo ol la hodiaŭa) ĉiam kontraŭstaris al novaj impostoj, al novaj sistemoj, kaj eble la granda eraro de la reĝoj estis, ke ili multe tro longtempe atendis por kunvenigi "la ĝeneralan ŝtatan asembleon", kiu sole povis forpuŝi la reziston de la parlamentanoj pri la impostoj. (La parlamentanoj estis burĝoj, kiuj aĉetis sian oficon). Ĝis tiam oni per friponaj rimedoj evitis malkaŝan bankroton : 1) Oni malagnoskis parton de la ŝuldoj, 2) Oni procesis kontraŭ la "maldelikatajn" bankistojn, kaj kompreneble monpulis ilin (Marigny, Jacques Coeur...), 3) Oni malgrandigis la oran aŭ arĝentan entenon de la moneroj : nenio nova de post Filipo IV-a la Bela...

Machault d'Arnouville en 1754-a provis starigi novan universalan imposton de 1/20 (t.e. 5%), kiu devis aplikigi al ĈIUJ monĝajnoj, i.a. tiuj de la ekleziuloj, kun kontroloj ankoraŭ neniam viditaj. La nobeloj kaj ekleziuloj rabie rezistis kaj Machault devis eksigi. Poste, abato TERRAY, kun subteno de kanceliero Maupeŭ kontraŭ la parlamentanoj provis repreni la ideojn de Machault. Bedaŭrinde, Ludoviko la XV-a mortis antaŭ la plena sukceso, kaj Ludoviko la XVI-a rezignis.

Poste la aferoj iris de malbone al plimalbone ĝis eksplodis la Revolucio, kiu fakte komenciĝis kiel anti-imposta leviĝo, sed la nova reĝimo ne pli bone sukcesis ol la antaŭa, kaj, ĉar ĝi estis pli persistema kaj tre obstina, ĝi kondukis al katastrofaj konsekvencoj...

Pretere, rimarkinda estas la konsisto de la reprezentantoj de la tria partio (Tiers Etat) : 45% da funkciuloj, magistratoj kaj oficproprietuloj, 25% da advokatoj, neniu kamparano...

Ĉar la balotoj rezultis el leviĝo kontraŭ la pli fruajn impostojn, la nova asembleo, spite ke, pro malbona impostkolektado, la

bankroto tujis, rifuzis kolekti la antaŭajn impostojn, sed tamen garantiis ĉiujn antaŭajn ŝuldojn, kio konsiderinde malbonigis la financon embarason. Oni do serĉis eliron almenaŭ provizoran el tiu sakvojo. Sub influo de TALLEYRAND, la ekleziaj bienoj estis forprenitaj je nomo de la "NACIO". Tiam oni havis la ideon, ke tiuj bienoj estu garantiato por emisio de naciaj obligacioj, kaj tuj poste alvenis la ideo de monpapiro garantiata per la naciaj bienoj (ekleziaj, nobelaj, de punitaj akaparistoj ktp). Tiu asigno donis la nomon ASIGNATO al tiu monpapiro. Sed fakte ne estis kontrolo super la emisio de la asignatoj, ke la garantiato sufiĉis. Ĉar samtempe ekzistis or- kaj arĝent-moneroj, ĉiuj postulis enspezpagojn per moneroj kaj strebis al elspez-pago per monpapiro, kaj se oni ne sukcesis ricevi monon el oro aŭ arĝento, oni postulis pli grandan sumon el papero por kovri la riskon. Sekve, la prezoj altiĝis. Por sorbi iom da mono la registaroj emisiis devigan prunteprenon, kies interezoj estos per papero pagataj. Sed neniu volis vendi ion ajn kontraŭ papermono, plie, la nedisciplinitaj armeoj rabis ĉe la kampuloj ; oni revenis al la kontrolo de la cirkulado de la varoj, speciale de la tritiko kaj faruno, kiuj baldaŭ malaperis, des pli ke la asembleo "CONVENTION" fiksis ties maksimumajn prezojn kaj ankaŭ de 40 aliaj "necesaj" varoj. Baldaŭ oni decidis tute regi la novan ekonomion pere de komisiono pri "nutraĵoj", kiu devis zorgi pri la distribuado de la nutraĵoj al la armeoj kaj al la mankhavaj regionoj. La rikolto ne estis malbona, tamen ekestis ĝenerala nutraĵmanko, kiun oni atribuis al la malamikoj de la Revolucio, kaj tio daŭris ĝis 1794-a kaj la falo de ROBESPIERRE.

Kiel mi jam skribis, ĝis 1791-a la asignato perdis 10% de sia valoro ; en julio 1794-a ĝi valoris ankoraŭ 33% de sia valoro, sed post unu plia jaro la valoro falis al 3%, kaj kun starigo de la DIREKTORARO ĝi falis plie al 1%... Tio koincidis kun tre malvarmaj vintroj de 1794a/1795a kaj 1795a/1796a kaj ekestis vera ĝenerala malsatego. Feliĉe la rikolto de 1796a estis bona, kaj oni toleris iomete da ekonomia libereco : libera cirkulado de grenoj, meze de 1797a. Bedaŭrinde la Direktoraro daŭre malsatis je mono, kaj sub alia nomo refaris la erarojn de la antaŭaj registaroj. Iu proponis vendi aŭkcio la naciajn arbarojn por revenigi la tro multajn asignatojn, sed fine oni nur lanĉis novan monpapiron sub nomo de teritori-mandatoj kun valoro de 2400 miloj da oraj frankoj ; tio estis kompreneble nura poezia revado : la kreado okazis je la 18a de marto 1796-a kaj jam la 4-an de aprilo la nova mono estis perdinta 80% de sia valoro kaj la 21an

de aprilo, 90% ! Tio estis okazo por friponaj profitoj. Ĉar la naciaj bienoj garantiis la monon, oni "aĉetadis" ilin, pagante per tiu vent-mono... Jen kelkaj tipaj ekzemploj, kiujn citas Florin AFTALION laŭ tiutempaj gazetoj. En Bordoza, luksa domo vendiĝis por 1/50 de sia valoro, nova domo por 1/30. En departemento GERS arbaro vendiĝas kontraŭ 60 000 mandat-pundoj, kio estas 3 000 frankoj el oro. La aĉetanto poste elhakigas la arbojn kaj vendas ilin kontraŭ 25 000 oraj frankoj, ktp... La mandato estis fine monnulligita la 4an de februaro 1797a kaj interŝanĝita kontraŭ kupono valoranta 1% de la mandatvaloro.

Ĉu ni kuraĝu nun riski nekutiman komparon, ĉu ni rigardu tion simpla koincido aŭ deviga sinsekvo, ke du inflaciegoj kuntrenantaj tiom da malordoj kondukis ambaŭ al katastrofoj? Tiu de la Revolucio tiom superis la eltenon de la franca popolo, ke ĝi, avida al reordigo, sin donis al Napoleono BONAPARTE. Tiu promesis efektivi en ordo la revojn de la revoluciuloj, tiel ke oni nomis lin "la Revolucio botvestita" ; sed li faris senfinajn militojn kaj kaŭzis morton de milionoj da homoj.

Dum la jaroj dudekaj, post la unua mondmilito, ankaŭ Germanujo suferis inflaciegon, kun tre forta senlaboreco kaj tre grandaj malordoj. La germana popolo, avida al reordigo, sin donis ankaŭ al revblinda diktatoro, kiu cetere ankaŭ promesis tute rebonigi la staton de la popolo. Fakte, li iniciatis longan militon, kaj kaŭzis la morton de milionoj da homoj.

Mi sentis bezonon skribi tion pri la Revolucio, ĉar post la fundaj studoj de Hippolyte TAINÉ (*Les Origines de la France contemporaine*, Laffont, Bouquins) kaj de modernaj ekonomiistoj* kiuj sukcesis kompreni kio estas inflacio, kiel ekzemple Florin AFTALION (*L'Economie de la Révolution Française*, Hachette, Pluriel), oni multe pli bone komprenas kio vere okazis, kio tute ne kongruas kun tio, kion oni instruis al mi en la elementa lernejo antaŭ pli ol duonjarcento. Tiam oni ne multe komprenis pri moncirkulado kaj monkvanto, sed mi ne certas, ke la nuna instruo multe ŝanĝiĝis tiurilate.

Jacques MANCEAU

*) Ni ne forgesu, ke la usona profesoro Milton FRIEDMAN ricevis la Nobel-premion pro sia kvanta teorio pri la mono kaj inflacio nur antaŭ kelkaj jaroj.

EKONOMIAJ DOKTRINOJ

Marks kaj Dubuen (Duboin)

Komparo de iliaj ekonomiaj doktrinoj

Kiamaniere ili analizis la kapitalisman ekonomion, kiuj estis iliaj konkludoj, kiajn anstataŭajn sistemojn ili proponis?

Mi opinias, ke ili alvenis al samaj konstatoj kaj konkludoj, sed ne sammaniere.

Marks bone montris, ke dank'al senĉesa perfektigado de la maniero produkti, la diserigo de la laboro, la uzado de maŝinoj, de naturaj energi-fontoj, la produktanta homo "laboristo" kapablas produkti pli ol li bezonas por sia vivteno. Tio ebligas ŝpari, uzi disponeblan tempon por ankoraŭ pli perfektigi la ilaron. Sed pli precize Marks studis la kapitalisman sistemon, la burĝan strukturon de la socio. En ĝi, la mastroj, la bienposedantoj proprietas la grupe produktitajn varojn kaj pagas al dungitoj nur por iliaj vivtenoj. Tiel pli kaj pli kreskas la riĉaĵoj de la mastroj kaj la kapitala akumulo. Tiu akumulado ebligas disvolviĝon de grandaj industrioj, de financaj potencoj, de grandaj landaj ekipaĵaroj. Li ankaŭ klarigis tion per siaj teorioj pri interŝanga valoro de la varo, pri rolo de la mono.

Li vivis en la komenco de la kapitalisma erao, do ne povis vidi kian gradon ĝi atingos. Nun la abunda produktiveco ebligas pagi pli bonajn salajrojn, sed profitoj restas por la mastroj. Eble li ne sufiĉe reliefigis la rolon de la pensantaj homoj, kiuj fariĝas ĉiam pli kleraj, pli lertaj, profesie pli kapablaj ; nek la rolon de la entreprenemaj, iniciatemaj, laboremaj, ŝparemaj labororganizantoj kaj kunordigantoj.

Poste, Dubuen faris proksimume samajn konstatojn. Li reliefigis, ke en la pratempo la homoj bezonis sian tutan energion por plimalpli kontentigi siajn bezonojn. Iom post iom ili fariĝis pli lertaj, inventis ilojn, armilojn, lernis utiligi la bestojn, la ventan, la akvofalan energiojn kaj tiel pli facile produktis la necesajn. Tiu produktado ne postulis la tutan tempon. Disparte iom da tempo por instruiĝi, perfektigi la metodon por produkti, la ilaron, la armilojn, ili progresis. Sed tiu kreskado estis malrapida. Lastatempe tiu progreso rapidiĝis. Nun per utiligo de energi-fontoj, de modernaj ilaroj kaj maŝinoj, de informadiko, la kolektiva laborado ebligas produkti ĉiujn necesajn, eĉ agrablaĵojn, per malpli da labortempo. En kapitalisma sistemo, kvan-

kam oni kolektive produktas, estas la mastroj, kiuj fariĝas posedantoj de la produktaĵoj. Ili disdonas al la dungitoj iom el la produktaĵoj. Ĉar ili produktas multe per malmulte da dungitoj, multaj homoj ne povas ricevi dungadon. Tiuj personoj estas sen enspezoj aŭ ricevas nur malgrandan kompenson. Tial ili ne povas aĉeti kaj apud abunde produktitaj varoj estas homoj, kiuj suferas mankojn. Li bone montris kiel la financistoj riĉiĝas per kreado de skribita mono. Aparte interesa estas la broŝuro "Les Yeux Ouverts" (Malfermitaj okuloj), en kiu li bone klarigas la evoluon de la vivkondiĉoj.

Tiel ambaŭ aŭtoroj akordiĝas, ke estas la progreso de la individua produktiveco aŭ rendimento, kiu ebligas bonan evoluon de la vivkondiĉoj.

Marks reliefigis, ke parton de tiu kapablo produkti estis akaparita de la burĝa klaso aŭ jam de bienposedantoj malprofite de la laborista klaso. Eble tiu koncentrado de la ŝparitaj riĉaĵoj estis necesa por progresigi la produktigajn rimedojn, por bonigi la ekipaĵaron. Jam dum la vivo de Marks okazis krizoj. Sed tio estis krizoj pro ekonomia kreskado. El tiuj krizoj la plej potencaj eliris ankoraŭ pli potencaj, damaĝe al la malpli potencaj. Malgraŭ la ekspluatado suferita de la laboristoj, tiu sistemo progresigis la socion al pli bonaj vivkondiĉoj, eĉ se multe pli por la potenculoj kaj malmulte por la aliaj, kaj ankaŭ per malŝparado de vivoj kaj riĉaĵoj en akraj bataloj.

Laŭ Dubuen ne eblas solvi la nunan krizon sen ŝanĝi la ekonomian sistemon. Ne plu eblas la antaŭaj solvoj: konkeri novajn merkatojn, krei novajn bezonojn. Tial ke la aĉetpovo de la laboristoj dependas de iliaj salajroj, tiuj, kiuj estas forĵetitaj el laboro, ne plu havas sufiĉan aĉetpovon. Eble milito estus solvo, sed nun ne plu eblas vastigi la imperiojn, kaj eĉ la favorataj klasoj estus minacataj.

Kiujn rimedojn ili proponis? Marks, la fundamentan ŝanĝon per venko de la laboristaro. Dubuen, per starigo de disdona ekonomio. Marks subtenis la laboristojn por plibonigi la vivkondiĉojn kaj sekurigi la laborkondiĉojn. La laboristoj konsciis pri la neceso grupiĝi, unuece agadi por plibonigi sian ŝtaton. Pli kaj pli ampleksiĝis tiu unueco kaj ĝia efikeco. Tiel naskiĝis la ideo de la laborista povo, kiu anstataŭas la burĝan. Marks parolis pri klasbatalo. Laborista klaso kontraŭ burĝa klaso. Fine venos la proletoj kaj starigos la socialismon aŭ komunismon. Dubuen proponis novan ekonomian sistemon: la disdona ekonomio. La ĉefa propono

S.A.T.-BROŜURSERVO

dec. 1992



CERCLE AMICAL ESP. AGENAIS
F-47470 BEAUVILLE
poŝtkonto : 3371 74 M Bordeaux

De pli ol 20 jaroj funkcias la broŝurservo de SAT, kiu eldonis ĉ. 160 titolojn (originalajn, tradukitajn aŭ prilingvajn broŝurojn). Jen ĉi poste la listo de tiuj, kiuj restas plu disponeblaj.

POR MENDI

En Eŭropo : Malpli ol 120 FF : pagi krome la realan afrankon post ricevo de la fakturo.

Pli ol 120 FF : la prezoj, en francaj frankoj, inkluzivas la afrankon.

Ekster Eŭropo : Ĉiukaze, pagi krome la realan afrankon post ricevo de la fakturo.

RABATO al libroservoj kaj monprovizantoj* kiam la mendo superas 120 FF : 20 % (Eŭropo), 30 % (ekster Eŭropo).

KIEL PAGI

Prefere rekte pagi al la administrejo (ĉi-supra adreso). Eblas pagi ankaŭ al perantoj de Laŭte! kaj al la UEA-sidejo (konto "ljjpb-b") menciante la numeron de la fakturo.

* Monprovizanto estas tiu, kiu ĝiras minimume 200 FF por plurjare ricevi Laŭte kaj eventuale mendi broŝurojn. Pri la ŝtato de sia "konto" la monprovizinto ricevas informon ĉiun jarfinon kaj ĉe baldaŭa elĉerpigo.

Sur la ĉekoj kaj ĝiriloj menci :
CERCLE AMICAL ESPERANTISTE. 3371 74 M Bordeaux

ABONO AL LA REVUO Laŭte!

Por 1993, Eŭropo : 60 FF. Ekster Eŭropo : 80 FF.
Ekster Eŭropo, per aviadilo : 100 FF
Jara kotizo al Amika E-Rondo Aĝenia : 20 FF.

BROŝUROJ DISPONEBLAJ ĈE SAT-BROŝURSERVO

Adreso : Cercle amical espérantiste F-47470 BEAUVILLE

Pôk: 3371 74M Bordeaux, samadrese

Mendkodo. Titoloj (Aŭtoroj)	Prezo en FF
Aa. La antaŭvenantoj de Anarkiismo (Armand)	4
AA. La Aperoĵoj de Ahasvero (Han Riner)	30
AL. Alvokoj al la homa konscienco (APJR)	10
ALT*. Al la tero returne (Ledon)	40
AN. Nia angorplena socio (Milan Šimečka)	3
AP. Amo per proverboj (Azevedo)	2
AT. Kial mi estas ateisto (A.Lorulot, tr. Valo)	30
AU. Al unu lingvo por Eŭropo? (Fettes)	5
BA. Bazoj de Anarkiismo (Balkanski)	25
BP. Legendo pri la bela Pekopeno (V.Hugo)	15
BU. La racia kaj ateista budhismo	5
ĈI. Ekologio : ĉu ideologio ? (W. Gunther)	3
CM. Civila Malobeemo (H.D.Thoreau)	10
ĈS. Ĉu socialismo konstruiĝas en Sovetio? (Lanti)	8
DI. Kiel diri...? (Lentaigne), E-frazeologio	30
EL. Elekto de tekstoj de Bakunin	10
ES. Por ekologia socio (Murray Bookchin)	15
ET. Etikoj I (Kropotkin)	15
EV. Eduko kaj vivsignifoj (Krishnamurti)	7
FA. Konstrui fajron (Jack London) novelo	5
FE. Esprimaro Franca-Esperanta (Bourgeois)	50
FF. La Forto de la Fortaĵoj (Jack London)	5
FI. Laŭ la fluo de l'interparolo (Bourgeois) Esp./Fr.	10
FP. Faux amis. Faux parents et "étrangers"	15
FV. Fronte al la vivo k.a. tekstoj (Krishnamurti)	10
FZ. Filozofio Zoologia (Lamarck)	25
HO*. La Evangelio de la Horo (Berthelot)	10
IE. Initiation à l'Espéranto (An Kaŭ)	5
IM. Individuista Manlibreto (Han Riner)	5
IN. Individualisma socialismo de A.R.Protschowsky	2
JA. Jaro 2000 (H.Muller) disdona ekonomio	35
KA. Kancero kaj Ekologio (Maurice Touchais)	15
KB. Kie brulas, ĝentlemanoj? (poemaro) Buchowski	18
KE. La Kvina Evangelio (Han Riner)	25
KI. El la kara infaneco... (Valo)	20
KP. Katastroplano pri Fessenheim-atomcentralo	5
KV. Kvardek paŝetoj al plua posedo (Lentaigne)	10
LA. Lingvaj anguloj (Baronnet)	25

* eldonejo "Fonto" (Brazilio)

LEK. La eta kato kiu ne volis morti (por infanoj)	5
LK. La Konflikto (Le Dantek) + Dubi (Alain) tr.Lanti	25
LL. Leteroj de Lanti (ĝis 1937)	50
LM. La Mondo ne havas atendejon (Dekker)	20
LN. Linguistique et non-violence (H.Masson)	3
LR. La Ribelo (Joseph Roth) romano	20
ME. La Mistero de nia surtera vivo (Archdeacon)	5
MM. Migrante tra Metioj (Valo) aŭtobiografio	25
MN. Ĉu militista defendo estas kredebla? (Lasserre)	6
MS. Memvola Servuto (La Boétie)	5
MV. Mia vivo. Artikolaro. Poemaro (Bartelmes)	15
NC. Naciismo (Lanti)	12
NI. Nia Individuismo (E. Armand)	6
NL. Naturleĝo, pensoleĝo, morala leĝo (Leo Polak)	3
NO. Nova Paradigmo en Psikologio (Feldman)	35
NT. Ne tiel, sed tiel ĉi! (Faulhaber)	15
PA. Pensoj de PASKALO (ekstraktaj)	20
PF. Proverbaro Franca/Esp. (Bourgeois)	20
PL. Esperanto kaj Literaturo (R.Laval)	5
PN. Politika Neperforto (M.A.N.)	8
PR. La Poemo de Rodano (Frederi Mistral)	30
PS. Psikotransformismo (Ergoto de Bonaero)	5
RO. Rompoj (A.Jacquard)	5
SE*. Sennaciece tra nia mondo (G.R.Ledon)	60
SR. Les 16 règles commentées (R.Laval)	3
SS. Sindikatismo. Sovetoj (A.Pannekoek)	5
ŜG. La Ŝtona Gasto (Michel Duc Goninaz) (teatraĵo)	5
TC. Por tutmonda civitismo (A.Gaynard-Rollet)	20
TD. Tiel diru! (Lentaigne) supl. de DI por francoj	30
TM. Tra la mondo per biciklo kaj esp. (Péraire)	25
TP. La Turo de l' Popoloj (Han Riner) romano	30
UN. Unu aŭ Nul (Guy Marchand) Mondcivitismo	30
US. Unueco super prokreda dividiĝo (Leo Polak)	3
VH. Ĉu ni vere helpas la trian mondon? (Roberts)	15
VL1. Verkoj de Lanti 1. (For la Neŭtralismon! La Laborista Esperantismo. Absolutismo. Herezulo. Herezaĵo. Adamaĵoj)	40
VL2. Verkoj de Lanti 2. (3 semajnojn en Rusio Tro Plena Gramatiko, Diskutejo, Epiloge)	30
VL3. Verkoj de Lanti 3. (Artikoloj, paroladoj kaj ekstraktaj el leteroj de 1937 ĝis 1946)	30
VO. Vortoj de Kamarado E. Lanti	20
VT. El verkoj de Leo Tolstoj (Patriotismo kaj registaro, Al politikistoj, Ĥodinka, Ne mortigu!)	10
ZH. La Zamenhofa Homaranismo (A. Caubel)	5

LISTO DE LA BROŝUROJ LAŬ TEMOJ

En la plena listo, signifo de la mendoj

* Esperanto kaj la laborista esperantismo :
AU, LL, MV, NC, TM, SE, VL1, VL2, VL3, VO, ZH.

* Literaturo :
BP, FA, KB, KL, LR, MM, MS, PL, PR, ŜG, TP.

* Filozofio - Psikologio :
AA, ET, EV, FV, FZ, KE, NO, PA, PS, RO.

* Liberpensoj :
AT, BU, LK, ME, NL, US.

* Ekonomio - Ekologio :
AL, ALT, CI, ES, JA, KA, KP, VH.

* Anarkiismo - Socialismo :
Aa, AN, BA, ĈS, EL, FF, HO, IM, IN, NI, SS.

* Mondcivitismo :
TC, UN.

* Pacismo - Neperforto :
CM, LM, MN, PN, VT.

* Diversaĵoj :
AP (Teatraĵeto), LEK (por infanoj)

* Por perfektigi
DI, NT, LA.

* Por franclingvanoj (varbi, inici, perfektigi) :
Varbi : LN - Inici : IE
Perfektigi : FE, FI, FP, KV, PF, TD.

LIBRO-SERVO de Amika E-Rondo Aĝenia

(samadrese) Aldoni la afrankon.

Junulkurso kun suplemento por franclingvanoj	48
Diskoferio por Junulkurso	45
Nouveau cours rationnel (bindita)	60
Kasedo por Nouveau Cours Rationnel	45
Dictionnaire pratique (F-E kaj E-F)	80
Dictionnaire de poche (F-E kaj E-F)	20
Grand Dictionnaire E-F (Waringhien)	90
Plena Vortaro	90

estas doni enspezojn al homoj, kiuj ne trovas laborpostenon, dank' al mono nur unu fojon utiligebla. Tiel oni pliiĝus la aĉetpovon de la konsumantoj kaj vigligus la produktadon kaj dungadon.

La intenco de Marks estis bona, sed li tro facile solvis la problemon. Ĉu malaperus la homa revolucio per la revolucio? Eĉ se oni ŝanĝos la povon, la produktanta laboristo ne ricevos valoron egalan al tiu de la varoj, kiujn li produktis. Plu estos pli simple elpreni parton por pagi la kolektivajn servojn, la solidarajn fondusojn, ŝpari por anstataŭigi la eluzitajn ilarojn aŭ modernigi, por efektiviĝi grandajn ekipaĵarojn. La Marksa teorio naskis danĝerajn iluziojn, kiuj poste naskos malkonfidon. Por ekonomia masstrumado necesas ankaŭ instruado, kompetenteco kaj honesteco. Tio estas des pli malfacila se la lando ankoraŭ ne atingis altan gradon de disvolviĝo. Tial oni povas kompreni kiom grandaj estis la malfacilaĵoj por la rusa revolucio.

Ĉu nun la laborista klaso konsistas el homoj kun samaj intereso-
soj? Granda parto laboras en la servoj. Ju pli kostas la servoj kaj ties laboristoj, des pli oni devas elpreni el la kreitaj riĉaĵoj. Se estas juste, ke oni pagu al laboristo por la liverita aktivado, ĉu en servo, ĉu en produktado, ankaŭ estus juste, ke ne estu tro granda diferenco kaj ke unuj kiel aliaj en kompara servo ricevu kiel eble plej egalan porcion. Ĉiu profesia kategorio batalas nur por propraj interesoj. Povas esti, ke akiritaj avantaĝoj superas justan dispartigadon de la kreita riĉaĵo. Se almenaŭ nun estus eraro starigi egalan dispartigadon, estus tamen bone ke ĝi estu pli justa, ne tiom malegala.

Eĉ se oni ne plu parolu pri klasbatalo, tamen plu necesas agadi por justo, paco, solidaro. La homoj agadas ĉefe por siaj individuaj avantaĝoj, sed ankaŭ por siaj rajtoj. Se la socio malegale traktas siajn membrojn, se estas tro da maljustaĵoj, ne sufiĉe da libero, da demokrateco, se la ekonomia sistemo ne kontentige funkcias, tio povas instigi homojn al agado. Homoj, kiuj ne esperas pliiĝi siajn proprajn interesojn, povas esti instigataj nur per moralaj devoj. Estas normale, ke la malfavoratoj unuiĝu kaj agadu por ŝanĝi la sociordon, sed ili devus atenti, ke la nova ne nasku novajn maljustaĵojn.

Dubuen reliefigis kiel la financaj potencoj (bankistoj) havas la eblecon akiri grandajn profitojn dank' al pruntedono de kreditoj. Tiel, per simplaj skribaĵoj, ili kreskigas siajn havaĵojn. Fakte, tiu skribita mono aldoniĝas al la cirkulanta mono. Pri la proponitaj rimedoj mi akordiĝas pri la principoj, sed ŝajnas al mi ne-

cese ŝanĝi kelkajn punktojn. Mi jam diris mian vidpunkton en alia artikolo. Dubuen esperis konvinki politikistojn pri la necesaj ŝanĝoj. Mi dubas, ĉu tiu granda ŝanĝo estus realigebla sen granda socia movado. Ankaŭ por ĝin praktike efektiviĝi, necesas granda fortostreĉo. Tio estos revolucia ŝanĝo, dezirinde ne per perfortaj agadoj, sed nur per venko de potenca movado.

En Amboise (SAĪ-Amikara kongreso) mi proponis al la abundana frakcio de S.A.T. la nomon "Frakcio por justa dispartiga ekonomio aŭ por ekonomio de justa dispartigado". La plimulto elektis la nomon "Frakcio por la disdona ekonomio". Mi bedaŭras, ĉar tiuj nomoj "abundana" aŭ "disdona ekonomio" povas erare kredigi pri facila aŭ malŝpara afero, eĉ per neekologia uzado de la produktiloj. Mi plu preferus "Movado por sociala justo".

O.P.

Abonoj al Laŭte en nepagipovaj landoj

Jam de pluraj jargj iuj legantoj de **Laŭte!** donacas al amikoj el orienteŭropaj aŭ afrikaj landoj abonon al nia gazeto. Por faciligi tiun solidarecon ni fiksi je **40 FF** la prezon por tiuj donacitaj abonoj. Menciŭ sur la ĝirkupono la adreson de la celata amiko.

Se vi deziras tiel helpi sed ne havas adreson por komuniki, mi elektos mem inter la multaj samideanoj, kiuj ŝatus legi **L!** sed ne povas transpagi.

En iuj landoj (Baltaj landoj, Bulgario, Pollando, Rusio...) perantoj sin proponis por helpi. Vd. la lastan paĝon de **L!** kaj ekriklatu kun ili.

Ĉiam restas ebla la kompenso de abonoj per E-libroj (ne gazetoj) revendeblaj en "Pagipovujo". Skribu al la sidejo de **L!** pri la libroj, kiujn vi povos sendi. **Kribo.**

El la muelejo : Kvankam ne tre facile, Solanĝa povas nun marŝi kun lambastonoj. Celante ree disponigi la renkontiĝejon, ni daŭrigas la loĝebligadon. Por la venonta somero jam estas sugestoj : teatro (J. & H. Castiau), E-instruado en komunik-situacioj (Katrín), renkontiĝo de e-istaj familioj (L. & F. Gabalda)...

En venontaj n-roj ni informos pri la progresado de la afero kaj la planitaj restaĵoj. **Kristiano.**



"Kiam al ĉiuj estas garantiata la libero sin esprimi, tiam fine povas venki la racia ordo."

W. Reich (Aŭskultu, hometo!)

POR KONSIDERO

Kvankam **Laŭte** estas por esprimi ĉies opiniojn, tamen en numero 101 pli valorus daŭrigi la artikolon "**Trafe instrui...**" ol tekstojn sur paĝoj 15, 16 kaj 17 pri reformo de Esperanto. Laŭ mia opinio tiajn tekstojn oni publikigu, nur tiam kiam vere mankas temoj interesaj por ĉiuj.

Mi povas nur kompati homojn, kiuj, anstataŭ studi Esperanton kaj serĉi solvojn por evoluigi ĝin laŭ pure esperantaj elementoj (kiel ekz. **desupri** - 7 literoj - ol **malsupreniri** - 12), nepre deziras altrudi reformojn, kiuj gvidas al **NENIO** kaj nur kaŝigus la lingvon. Laŭ mi tio estas nur perdo de tempo, energio kaj... valora spaco en **Laŭte!**

Aldone, gratulojn por **VALO**, kies artikoloj ĉiam estas interesaj, ĉar trafaj kaj bone argumentitaj.

Mila van der Horst-Kolinska

LA KVINA KOLONO (kaj K-io)

Povas okazi, ke ne ĉiuj gelaŭtuloj havas plenan komprenon pri la signifo de la esprimo "Kvina Kolono", ĉefa titolo de ĉi tiu artikoleto. Ĝi originis antaŭ pli ol duono da jarcento, okaze de la interfrata hispana milito, kiu donis la povon al la tirano Francisko Franco, kiu melis finan punkton al la Hispana Respubliko. Li atakadis la hispanan ĉefurbon,

Madridon, per kvar kolonoj da soldatoj kaj en tiu okazo li diris : "Interne de Madrido mi havas la kvinan kolonon", nome, tiujn, kiuj apogis lin kaj deziris la falon de la Respubliko.

Kaj post tiu konvena klarigo mi komencas...

En Esperantujo floras abunde gramatikemuloj, neologismemuloj kaj reformemuloj (precipe en la lasta tempo sur la

paĝoj de L! reformemuloj ekfloreĝis).

Esperanto estas facile lernebla lingvo en komparo al la nomataj naturaj, kvankam la tri "emuloj" menciitaj en la antaŭa paragrafo faras ĉion eblan por malfaciligi tion, kio estas facila.

Gramatikemuloj. Ĉi tiuj uloj kredas, ke lingvo estas matematikaĵo, ekzakta scienco, kaj ili pretendas, ke ĉiuj skribu same; kaj jen determinitaj esprimoj, nestereotipaj esprimoj, kiujn mi uzas kaj kiuj terurigas gramatikemulojn:

Post ekspluati nin, li malaperis / Laŭ oni instruis al mi / Tago, kiam mi estis knabo / Certa tago, kiam mi vidis ŝin / Laŭŝajne li estas soldato / Laŭdirite en la antaŭa paragrafo k.c.

Se ĉiuj komprenas kion mi volas diri, ĉio alia estas superflua. Lingvo estas io viva, kiu permesas al ni esprimi ĉiujn nuancojn de la penso diversmaniere. Gramatiko estas necesa, sed la troa gramatikumado tute ne.

Neologismuloj. ("Kvina Kolono" en Esperantujo). Ili ne ĉesas enkonduki nenecesajn vortojn, kiuj pufigas vortarojn kaj konfuzas la nove bakitajn samideanojn; aldone ili kontraŭas al la uzo de la prefikso "mal", kiu ĝuste faciligas la lernadon de Esperanto.

Se mi scias, ekz.: fermi, alta, supra, dekstra k.s., mi jam scias: malfermi, malalta, malsupra, maldekstra k.s. kaj mi ne bezonas lerni: aperti, basa, infra, liva k.s.

La "anoj de la kvina kolono" argumentas, interalie, ke se troviĝas sur strato ĉi tiu averto "Turnu maldekstren", la pluvo povus forviŝi "mal" kaj tiam oni legus: "Turnu dekstren".

Sofista argumento! Tiam ĉiuj numeroj, kiuj distingigas la domojn en la urboj, devus esti skribitaj cifere kaj litere, ĉar pluvo same povas forviŝi literojn kiel numerojn, ĉar pluvo ne praktikas raciismon.

Reformemuloj. Multe malpli danĝeraj ol gramatikemuloj kaj neologismuloj, t.e. la "kvinakolonanoj".

Reformemuloj ekzistas ekde la tago, kiam Esperanto iĝis publika. Jam en 1894-a ili deziris ŝanĝi la lingvon, sed la amaso de la tiamaj Esperantistoj rifuzis reformojn.

Tiuj reformemuloj ĝenas kaj, aldone, donas ekskuzojn al la malamikoj de nia lingvo por esprimi, ke Esperanto bezonas reformojn, t.e. ke ĝi ne taŭgas.

Reformemuloj ĉiulandaj, ĉesu elspezi energion vane! Reformemuloj ĉiulandaj, aŭskultu! Nia lingvo ne bezonas reformojn, kaj se al vi ne plaĉas la ĉapelitaj literoj, uzu:

ch gh hh jh sh u, kion proponis Zamenhof kaj oficialigis la Akademio de Esperanto.

Afablajn salutojn al ĉiuj ĝelaŭtuloj.

A. Lopez Luna

Favore al Esperanto

De tempo al tempo malpacienculo proponas sian propran nacian lingvon anstataŭe de Esperanto kiel tutmondan lingvon, pretekste ke ĝi estas unu el la plej uzataj lingvoj. La lasta de tiu serio estas Borvo, kiu proponas la anglan. Antaŭe estis aliu, mi ne kapablis trovi la artikolon, eble estis antaŭ 2-3 jaroj, la tempo tiel rapide forpasas... Li proponis la hispanan, ĉar laŭ natura evoluo, post kelkaj jaroj, ĝi fariĝos la plej uzata lingvo en la mondo pro la kresko de la loĝantaro en Sud-Ameriko. Nu bone, sed ni ekzamenu pli amplekse iliajn argumentojn kaj la niajn.

La plej uzata lingvo en la mondo senkonteste estas la ĉina, 2/3 el la Ĉinoj uzas la oficialan ĉinan lingvon. Ĉu ĝi estas pli malfacila ol la angla aŭ male, mi ne scias, ĉar mi ne scipovas la ĉinan. Tamen jen kelkaj argumentoj. La ĉina gramatiko estas sufiĉe facila, la vortoj ne estas variigeblaj, ne estas marko pri pluralo, ne estas deklinacioj, kompreneble kiel en la franca la ordo de la vortoj tre gravas. Kompreneble la lernado de la multaj signoj uzataj por skribi timigas la plejmulton, estas miloj da signoj konendaj. Sed oni povas skribi ĝin per latinaj literoj, tiel estas multe pli facile, ĉar fonetike. Lasta avantaĝo de la ĉina: la prononcado estas tre klara, kiel mi mem spertis, aŭdante ĉinojn en Madagaskaro kaj aliloke. Tre grava avantaĝo super la angla lingvo, kies prononcado estas ege malklara, tre fantazia, en kiu estas nenia rilato inter tio, kio estas skribata kaj kio estas parolata. Lasta punkto: en Eŭropo la plej parolata lingvo estas la germana.

Do ŝajnas, ke la nombro da uzantoj de iu lingvo ne estas kontentiga kriterio. Mi opinias, ke la facileco paroli kaj skribi lingvon, bona korelativo inter la parolaj kaj skribaj formoj, t.e. klareco, estas la ĉefaj kriterioj por tutmonda lingvo. Kompreneble vi rajtas opinii la malon.

Kial la angla lingvo tiom gravas ekstere? Nu, tute simple, ĉar Usono estas la plej riĉa, la plej potenca lando en la mondo. Konsekvence, ĝi estas la plej progresinta lando

en sciencoj kaj teknikoj. Nun gravas scipovi la anglan por kapabli uzi la librojn kaj la publicaĵojn usonajn. Sciencoj kaj teknikoj nepre bezonas internacian lingvon por flori. Nun en Usono oni ne instruas fremdajn lingvojn en unuakaj duagrada lernejoj. Nur en la universitato kaj tute ne devige. Sekve, kiam neanglalingvaj sciencistoj publikigas la rezultojn de siaj esploroj, ili devas publikigi ilin anglalingve, se ili volas esti legataj. Tial en Eŭropo la fremda lingvo plej instruata estas la angla.

Kiam Borvo riproĉas al la esperantistoj ne uzi la servon de komercistoj ktp. cele al disvastigo de Esperanto, li forgesas gravajn punktojn. Unue, la rolo de komercistoj estas gajni monon kiel eble plej rapide, konkurenco trudas tion. Due, ne estas la rolo de komercistoj disvastigi konojn, helpi al la socio, tio estas la rolo de la registaroj. Almenaŭ en Eŭropo, de pli ol 45 jaroj, de la fino de la dua mondmilito, la registaroj trudas la anglan lingvon ekde la duagrada lernejo. Kun kia rezulto? Milionoj da geknaboj studas la anglan dum 3 ĝis 10 jaroj. Tre malmultaj scipovas ĝin iam. Oni elspezas ĉiujare milionojn da monunuoj por instrui lingvon, kiun tre malmultaj kapablos uzi flue. La plej lertaj legos ĝin flue, post multaj jaroj da lernado; tre malmultaj parolos ĝin, kaj kapablos kompreni ĝin parole; nur tiuj, kiuj pasigos 5-10 jarojn en anglalingva lando, scipovos ĝin. Dume, Esperanto povus esti lernata tute bone en malpli ol 3 jaroj, kaj poste oni povus uzi ĝin por plua studado, tiel fortigante la praktikon.

Kian simpligon proponas Borvo, kiam la ĉefa malfacilaĵo de tiu lingvo estas la prononcado? Se la angla ne estus tiom malfacila, la rezultoj estus okulfrapaj. La Eŭropanoj ne estas ĉiuj stultuloj. Multaj scipovas legi la anglan kaj nenion komprenas kiam ili aŭdas ĝin. Sufiĉas partopreni fakan kongreson internacian por konstati tion. Vi povas uzi sonbendojn ktp., vi plibonigos vian propran prononcadon, sed ne plibonigos vian komprenon, ĉar la prononcado ne estas klara, nek unuforma.

Kompreneble, por multaj ne necesus scipovi la anglan. Sufiĉus, ke oni sciu iomete por helpi al si (angla kiel helpilingvo). Nu, ĝuste en tiu kazo ĝi estas la plej malbona lingvo. Du spertitaj anekdotoj al vi pruvos tion. En 1951, mi venis por la unua fojo en Brition. Mi jam studis la anglan de

12 jaroj. Mi legis flue multajn librojn, romanojn, sed ankaŭ teknikajn librojn kiel "The atomic age opens", "TVA or the democracy on the march", mi kapablis identigi plantojn pere de "Flora of West Tropical Africa", ktp, ktp. Mi serĉis en Londono: Warwick Street; do mi petis la vojon, provante zorge prononci "Ŭarŭik strit". Neniu komprenis. Finfine mi montris la vorton skribita sur papero. Fakte oni devas prononci "Ŭorrik strit" (eskuza la eventuale malbonan fonetikan skribon). Kian uzon povas havi helplingvo, kiam vi eĉ ne kapablas peti informon survoje?

En januaro 1979, mi alvenis en hotelo en Cairns, Norda Kvinslando, orienta Aŭstralio. Post la salutoj, la dommastrino demandis ion al mi. Ĉar mi nenion komprenis, ŝi rediris la frazon en lingvo pli klara por mi, kaj tio signifis "Do, la aŭtobuso jam alvenis?". Se vi ne komprenas tiom simplan frazon, kian uzon havas tiu helpa lingvo? Ĉu vi opinias, ke "Dallas", "Santa Barbara" kaj aliaj felietonoj usonaj (soap opera) estas ĉefverkoj de literaturo, rezervataj al superaj intelektuloj? Tute ne, sed milionoj kiel mi ne kapablas ion kompreni, aŭdante ilin.

Iuj opinias, ke mi troigas, sed se vi ne konas ion pri la angla lingvo, sciu, ke ĉiu vokalo havas 4-5 sonojn, ke vi neniam scias klan sonon vi devas uzi, ekzemple: "war" estas prononcata "ŭor". Ofte la duono de la vortoj estas glutata. Leicester Square oni prononcas "lester skuer", "Worcester" fariĝas "ŭorster". Por kompliki la tuton, la diversaj tribanoj aŭ etnoj laŭvole, ne same prononcas, ne nur en Britio, sed ankaŭ en Usono, aŭ en Aŭstralio. "The received pronunciation" preskaŭ neniu uzas krom eksterlandanoj kaj ekskolonitoj. Dume, en Germanio ekzemple, kie la lingvo estas ĉiam klare prononcata, kiam vi alparolas al Germano en oficiala germana lingvo (Hoch Deutsch), li tuj respondas al vi en la sama lingvo, ne en iu ajn ĵargono (Platt Deutsch).

Por ke Esperanto triumfu, necesus kaj sufiĉus ke la registaroj instruigu ĝin en la lernejoj. Tiam, verŝajne la plej multaj el la lernantoj tuj adoptos Esperanton, kaj multaj rifuzos plu studi naciajn lingvojn kun iliaj strangaĵoj gramatikaj kaj aliaj, por dediĉi pli da tempo al aliaj temoj. Verŝajne estas tio, kion timas la registaranoj, la naciistoj, la reakciuloj ĉiuspecaj. Fakte, ĉiutempe estis progresemoj kaj reakciuloj. De tempo al tempo unuj aŭ iliaj maloj triumfas.

Nun estas la triumfo de la reakciuloj, kiuj aplaŭdas la falon de la progresemluloj. Estas la renaskiĝo de naciismo kaj konsekvencaj militoj, ktp... Sed tio ne solvas la problemojn de la falonta kapitalismo (pro daŭra ekonomia krizo, kadukiĝo, ne adaptiĝo al la progreso). La rado turniĝas kaj ne morgaŭ, sed post dekoj da jaroj, denove la ekonomiaj kaj sociaj problemoj trudos novan organizon de la socio. Tiam estos evoluo en la ideoj kaj pensmanieroj, kaj Esperanto havos ŝancon, la ŝancon de ĉiuj raciaj eltrovaĵoj. En UNO ili inventaris 3500 etnojn aŭ tribojn (laŭvole). Ĉu ili ĉiuj devus militi kiel en Jugoslavio kaj en diversaj partoj el Afriko? Ĉiel la evoluo estas malrapida je la skalo de homa vivdaŭro. Vidu : la metra sistemo kreita dum la franca Revolucio en 1795 fariĝis uzata en 1840 en Francio, eĉ de 1816 en Nederlando, sed nur post 1860 ĝi disvastiĝis en multaj landoj. Sed ankoraŭ nun la gejunuloj el Usono kaj diversaj anglosaksaj landoj praktike ne konas ĝin. Ili bezonas konverti en proprajn mezurilojn por havi klaran ideon. Tio estas afero de praktiko, de uzado, same kiel la lingvoj. Se vi legas nur okaze kelkajn paĝojn en la angla, vi neniam scipovos legi ĝin, kaj ankoraŭ malpli paroli ĝin.

Kompreneble, mi nenion povas riproĉi al la hispana lingvo al aliaj, kiel la itala, germana, rusa. Sed ĝenerale ili estas pli malfacilaj ol Esperanto. Krome en la hispana ne abundas la originalaj sciencaj publikigaĵoj. Fine, nenia lingvo plaĉas al la naciistoj, kiuj ŝvarmas nune. Do kial ne Esperanto? Ĉu ĝi ne estas sufiĉe facila, sufiĉe racia? Kiel diris al mi iam L. Bannier : Necesas konservi Esperanton por la estonto. Esperanto vivas jam de pli ol cent jaroj. Kial ne plue?

J. Deker

Bibliografio :

La informojn pri la ĉina lingvo mi ĉerpis el :
 Roger Caratini : Bordas Encyclopédie, Sciences Sociales
 2. Linguistique, Bordas, Parizo 1975.
 Manuel de Chinois, Eldono "Sangwu", Pekino 1964.
 Pri angla prononcado :
 H. Adamczewski, D. Keen : Phonétique et Phonologie de
 l'anglais contemporain, A. Colin, Parizo 1973.

---o---

Responde al BORVO

Mi ĵus prenis skribilon por respondi al la BORV-aĵo en L! 100, sed jen enfalas en mian leterkeston Laŭte 101. Tro malfrue! Eble tamen kelkaj el miaj komentoj estas ankoraŭ skribindaj :

- (1) BORVO asertis, ke "Esperanto ne bone fartas." Laŭ kiaj kriterioj ? Duono de la romanoj originale verkitaj en Esperanto aperis post 1980, plejparte en Pagopovujo. Ankaŭ la scienca interesiĝo pri Esperanto mirinde kreskis dum la lasta jardeko.
- (2) BORVO asertis, ke "la idealistoj", kiuj estras la movadon, neniel volas ekrilati kun komercistoj. Tamen la E-Movado ne estas armeo, apenaŭ havas estrojn, kaj havas ankaŭ tre komercemajn membrojn.
- (3) BORVO asertis, ke "la usonangla antaŭeniras grandpaŝe en la mondon". Tamen la proporcio de la monda loĝantaro, kiu parolas la anglan, konstante malkreskas. Iam (eble ne plu) la angla estis la dua plej parolata lingvo en la mondo. Oni prognozas, ke ĝi estos en la kvara pozicio meze de la venonta jarcento.
- (4) BORVO asertis, ke la usonangla "ne estas malproksima de la fina venko". Tamen la angla lingvo (male al Esperanto) ne havas celon kaj ne povas "venki".
- (5) Ŝajne BORVO kredas, ke la usonangla iel minacas Esperanton. Tute male! Se Aziano lernas la anglan, ni ĝoju, ĉar tiu Aziano multe pli facile povos lerni Esperanton.
- (6) BORVO trovas, ke Esperanto estas "senespera kaj senesperiga afero". Mi kompatas, sed mi ne povas konsenti. Esperanto estas la lingvo, en kiu mi plej ofte legas kaj skribas, la lingvo, en kiu mi plej ofte pensas, kaj la lingvo, kiun parolas preskaŭ ĉiuj miaj amikoj. Min ĝi ne senesperigas.
- (7) BORVO asertis, ke jam ekzistas "usonangla simpligita kaj kripligita lingvo", "uzata de ne-anglosaksoj tutmonde". Videble BORVO ne konas la anglan lingvon, ĉar lia simpligita lingvo tute ne ekzistas. Ekzistas nur homoj, kiuj malbone parolas ekzemple la britan aŭ la usonan.

Germano parolas la anglan tre malsame ol franco.

(8) BORVO kredas, ke eblas "aliigi" la anglan. En 1908 oni malsukcesis aliigi Esperanton. Ĉu BORVO kredas, ke la angla estas hodiaŭ malpli stabila ol Esperanto en 1908?

(9) BORVO eble kredas, ke simpligita angla lingvo kapablas ekzisti paralele kun la tradicia angla lingvo. BORVO rigardu la socilingvan situacion en Jamajko por trovi malpruvon.

(10) BORVO volas "krei societeton de anglalingvaj Mondlingvanoj". Jam ekzistas kvino da tiaj projektoj. Neniu el ili sukcesis pli ol Ido. Ŝajnas al mi, ke la celo de BORVO estas multe pli "senespera kaj senesperiga" ol la Esperanto-celo. Mi konsilas al BORVO trovi pli sanan celon por siaj klopodoj.

Edmundo

La kontribuo de Borvo provokis tre multajn reagojn, jen argumentatajn, jen sektemajn. Ŝajnas, ke la tiel nomiĝantaj esperantistoj ne kapablas koncepti pri tio, ke E^o ne estas akceptata kiel internacia, universala mondlingvo, kio estas malakcepto de la realo.

La angla ja estas la nura mondlingvo, instruata kaj lernata en ĉiuj kontinentoj kaj landoj sen iu konkuranto. La aliaj internaciaj ĉeflingvoj (hispana, portugala, araba, rusa, ĉina...) estas nur zondlingvoj sed neniel tutmondaj.

E^o fiaskadas ĉar :

- ĝi estas artefaritaĵo,
- ĝi estas de neniu tuje komprenebla nek identigebla,
- kvankam ĝi similas la okcidentajn lingvojn, ĝi estas pli rigida kaj malfacile asimilas la neologismojn.
- ĝi disvastiĝas nur propagande.

En sia konkludo Borvo proponas reformon de SAT en AWO-n, tio estas Anational World Organization... Tiu koncepto sennacieco estas anakronika, ideologia nocio, kiu nenion signifas por la plimulto de la homoj por kiuj nacieco ja estas depostulaĵo kaj tute ne trudaĵo... Fakte, la demando estas pri internacieca kaj tutmonda kunlaborado. Do, nia "Anational" iĝu

tutsimple "international" kaj, ĉar tiu vorto pleonasmas kun "World" sen kovri saman signifon (internacia ja ne estas tutmonda), ni konservu nur "World" kaj parolu pri "World Organization"...

Sed kial : organizaĵo? Ĉu nia mondo jam ne ekzistas? Kaj ĉu ne sufiĉas, ke oni en ĝi vivu kaj evoluu kun plena konscio pri ĝi? Ni do fariĝu la "organizaĵo" kaj nur konsciĝu pri tiu ĉi realaĵo : WE ARE THE WORLD.

Patriko.

SINCERE KAJ MALGAJE VIA...

Estimataj Samideanoj,

Kiam mi verkis mian artikolon : "Ĉu ni rezignu pri Esperanto?", tio kompreneble estis provokado kaj mi ne miris pri la furiozaj kaj ŝokitaj leteroj, ĉar tio estis mia intenco. Tamen mi ne provokis por la nura plezuro provoki, sed por ŝoki la homojn tiamaniere, ke ili ekkonsciu pri la malbona farto de la movado kaj ekopiniu, ke estas necese reagi kaj forlasi la nuran idealismon kaj bonvolemon por savi kaj akceli Esperanton. Tiurilate mi estis tre seniluziigita ; evidente la esperantistoj preferas flegi sektan spiriton ol alfronti la mondon kaj labori profesie, aŭ instigi homojn labori profesie por kaj per Esperanto.

Miavice, mi estis tre ŝokita de k-do Modesto, kiu skribis, ke la angla lingvo estas : "lingvo de komercistoj, ŝtelistoj kaj banditoj". Tio estas tute senbaza akuzo kontraŭ la Anglosaksoj. Ĉu la Anglosaksoj ne estas parto de la homaro? eĉ parolante la anglan. Kaj kial ili estus amase ŝtelistoj kaj banditoj? La esperantistoj uzas la vorton "Homaro" kun majusklo, sed tio estas nur teorio, en la realo, ili ne tiom zorgas pri ĝi, precipe se tiuj aliaj anoj de la "Homaro" havas alian ideologion. Tiurilate mi ne atakas aparte k-don Modesto, tutsimple tio estas la ĝenerala sinteno de la idealismuloj kontraŭ la realismuloj.

K-do Igorj skribis : "Ĉe ni, en Ruslando, malgraŭ nunaj plagoj kaj antaŭribela stato de la lando, nombro da

esperantistoj kreskas, malrapide sed certe." Bone, sed ĉu la angla lingvo ne progresas multe pli rapide en Ruslando? Krome la Rusoj, kiuj eklernas Esperanton, povas nenion fari per ĝi, se en la pagipovaj landoj la nombro da esperantistoj estas malespere malalta kaj sekve de tio la Okcidentanoj ne helpas ilin. Multaj nove bakitaj esperantistoj rusaj neeviteble kabeos.

K-do Igorj tute pravas, kiam li aludas pri la kialo de la nuna sukceso de la angla lingvo kaj pri la versaĵna evoluo de la mondo. Ankaŭ probable la angla lingvo perdos sian nunan gvidan rolon. Sed ĉu favore al Esperanto? Ĉar la problemo estas tiel, ĉu Esperanto transvivos tiujn estontajn tempojn? En la pasinteco la egipta lingvo mortis, la kelta lingvo mortis kaj multaj aliaj; inter la artefaritaj lingvoj jam mortis Volapük kaj Ido. Kia Dio, kia mistika revelacio garantias al ni, ke Esperanto ne malaperos post kelkaj jardekoj? Krome mi ne kredas, ke la plimulto de la laŭtuloj estas mistikuloj.

Koncerne la respondon de k-do Castiau mi devas aldoni, ke mi eklernis Esperanton antaŭ kvar jaroj pro nura lingva scivolemo. Poste mi tre ŝatis la lingvon pro ĝia simpleco kaj belsoneco. Sed, ĝis nun, mi vere ne havis ĝuon rilatante kun esperantistoj: "tro da gemaljunuloj, da eternaj komencantoj, da harfendistoj, da kvereloj kaj kverelantoj. Sed antaŭ ĉio tro da idealismo fora je la realo kaj tro da misagado rilate la strategion por disvastigi la lingvon." Krome mi estas mezaĝulo kaj mi ŝatus uzi Esperanton kun eksterlandanoj, kiuj ne scias la francan kaj kun kiuj mi povus interŝanĝi ideojn kaj faktojn. Bedaŭrinde, mi renkontas tre malmulte da eksterlandanoj, ĉar mi ne havas financajn rimedojn por ofte vojaĝi, kaj ĝenerale tiuj eksterlandanoj scias tre ofte bone la francan, aŭ alian lingvon, kiun mi posedas: ekzemple la germanan aŭ la anglan. Tial mi povus senprobleme malhavi Esperanton.

Aŭ ili ne scias aliajn lingvojn escepte de sia gepatra lingvo kaj Esperanto, sed tiam ili ofte malbone kaj fuŝe parolas E-on kaj malbone komprenas kaj estas malfacile kompreneblaj.

Ĉu la nunaj malmultnombraj esperantistoj tro kutime maljunaj kaj tro revemaj povas batali kontraŭ la potenco de Usono?

Mi ne volas daŭre pledi por la angla, sed ĝi estas lernebla, kvankam pli malfacile ol Esperanto. Oni povas vojaĝi per la angla tutmonde, aĉeti ĉie regule aperantajn gazetojn en la angla, aŭskulti facile radio-elsendojn en la angla, trovi facile multajn interesajn librojn en la angla. Kion faris la maljunaj generacioj por disvastigi efike E-on aŭ nur por konservi ĝin, en Okcidento, en la stato kiel ĝi estis antaŭ kvardek jaroj? Estas facile kulpigi la televidon pro la malintereso de nuntempaj homoj al Esperanto. Sed malgraŭ la televidio la lernantoj de la angla lingvo trovas tempon por ĉeesti vesperajn kursojn de sia lernobjekto. Eĉ surkampe de la idealismo, la pasintaj generacioj esperantistaj ne alstrebis krei novan ideologion adaptitan al la nuna evoluado de la mondo por allogi gejunulojn aŭ mezaĝulojn.

Ni, pli junaj generacioj, troviĝas antaŭ dezerto aŭ kampo de ruinoj. Ĉu ni sukcesos fari el ĝi denove floran ĝardenon? Kelkafoje mi esperas, sed pli ofte mi malesperas. Kaj tio instigas min pripensi, ke mi agus pli saĝe, kabeante, ol baraktante tute vane. Mi havis lastan esperon kaj mi intence ŝokis la laŭtulojn por vekti ilin. Bedaŭrinde ili preferas revadi.

Al k-do Calamy mi klarigu, ke Borvo devenas de la nomo de kelta diaĵo de la fontoj kaj tute ne rilatas kun "korvo". Mi elektis tiun nomon pro ĝia o-finaĵo, kiu donas al ĝi aspekton esperantan.

Sincere kaj malgaje via

BORVO.

AROGANTECO DE RELIGIO...

La kontribuado de Delfero Tietti pri la enkonduko de morto laŭ la libro de Genezo memorigis min pri la pensoj de Bernard Shaw pri la paradoksoj, kiujn li brile traktis en sia teatraĵo "Reiru al Metuŝelah" (Back to Methuselah). Kvankam li estis ateo, li klarigis, ke tiu rakonto pri la Ĝardeno de Edeno fascinis lin pro sia pura daŭreco, kaj sentis do, ke ĝi devas enhavi ian atavisman veron pri la frua konscio de la homaro.

Laŭ lia teatraĵo, ĝenas Adamon la timego de eterna vivo, la perspektivo, ke oni devus vivi tra "pli da

tagoj ol estas sableroj apud la du riveroj, kaj tiam esti tiel malproksima de la fino kiel ĉiam". Estas Eva, kiu lernas per la serpento, ke vivo ne devus esti eterna kiam ili lernos kiel fari novajn Adamojn kaj Eva-ojn. Tiel la malkovrado de sekso estas nepre antaŭnecesajo por ricevi la benon de morto. Teistoj, kompreneble, vidas sekson kaj morton kiel malbenon, dum Shaw lerte montris ilian utilecon. Mi ĉiam, kiel ateisto, kontestas la hipokritecon de teistoj pri du vitalaj punktoj, kiuj kreskas el la libro de Genezo. Unue, la Falo estis ago de la nura homaro, do tiel la bestoj estas esceptitaj de ĝi (kaj ĝiaj kondiĉoj). Ili do tamen ekzistas en la stato de graco, en kiu ili estas kreitaj kaj alkondukitaj de dio al Adamo, por ke li nomu ilin. Adamo kaj Eva devis esti vegetaranoj (punkto akcentita de Shaw). Do, por la eklezio katolika, dekreti, ke bestoj ne havas animojn estas videble kontraŭdira al la teksto de Genezo. Due, la koncepto de eterneco estas io, kion la homa menso ne povas inteligente kompreni. Teistoj malice konsideras kun plezuro la perspektivon de pekuloj suferantaj turmentojn eternajn en infero, sed malsukcesas percepti ke, submetite al turmento "tra komplete eterneco", oni povus, tra tiu tempo, transformi tiun doloron en plezuron, sendube spertante ravajn orgasmecajn sentojn ĝis oni fine eĉ tediĝus. Morto ja estas domaĝe. (La teatraĵo de Shaw asertis, ke ĝi ŝajnas tiel senkompata, nur ĉar oni vivas nesufiĉe longe. Li rezonis, ke, se oni povus vivi ĝis ĉirkaŭ 300 jaroj, oni do povus esti preparita por bonvenigi morton kun sereneco kaj trankvilo). La religio konstante pretendas, ke ĝi estas la aliancano de vivo, sed la tuta historio montras, ke ĝi estas malsanece ligita kun nia timego de morto, kaj nia diboĉa devigo venĝi nin mem kontraŭ dio per senĉesa milito kaj suferigado al la restaĵo de lia kreaĵo. La kristana fako de religio postulas eĉ, ke li mem mortu, por ke ni povu vivi por ĉiam kaj eterne, kaj ĉiam kaj eterne... Kia infaneca, aroganta kaj fine stulta sensencaĵo tio estas! Kvankam mi mem ne estas tiel aroganta kiel dikredanto, se li ja ekzistus, mi volonte povus kompreni, ke li respektus la vivon de erinacido tiel ŝate kiel la mian. Kiam la aroganteco de religio malkreskos sufiĉe por akcepti tiun

koncepton de dia kreitaro, tiam ni povos trovi la morton malpli terura kaj timiga. Eble ni povos tiam lerni kiel oni povus pli longe vivi!

Dave GODIN.

S. BONIOL

EN KATEDRALO

Sub lumvitralo, sub la volb-elano
Jen mi terano.

Ena sufero,
Streb' al espero,
Atendo bora.
Kaj preĝ' angora

Post venko de la dubobaro
Fandiĝas en la ŝtonarbaro.

Dolorpistita koro mia krevas,
Sed ĝin la pilieroj alten levas.

Vivigas volban muton nun l'orkestro
De l'orgenestro.

Voko provluda.
Senbrido tuta
De kor' impeta,
Respondopeta.

Demandosigna eta frazo
Sin ŝovas tra la tembr-emfazo.

Voĉeton mian feblan ekrelajzas
L'akordoĉen'. Supere l'ondo pasas.

Desupre lante ŝvebas la respondo :
Imunda eĉe vibras luma l'ondo.

Fajra flavruĝ' en sundefalo
Varmigas bluon sur vitralo.

Bunto blindiga,
Lumo mistika,
Kor' dankoplana,
Paco serena.

Al homa dramo
Tra lumoŝpruc', respondas Dio : "Amo !"

NI RICEVIS...

SADE, Florville kaj Courval aŭ fataleco. Tradukis Armela LeQuint kaj Ĵak LePuil. Eldonis G.R. Ledon. 80 paĝoj, 6 us.dol.

Supozeble, kvankam tiu estas la unua teksto de SADE iam publikigita en esp-o, ĉiu jam legis ion de la fama Markizo, kies nomo fariĝis radiko pli-malpli fuŝa por "nenormala" seksa praktiko. Tiu ĉi rakonto apartenas al la de ĉiuj leg-eblaj tekstoj, ne al la plej provokaj. La ŝatantoj de pornografiaĵoj seniluziigu: tie SADE viciĝas inter la klasikuloj de la franca literaturo kun bela lingvaĵo - ja bone tradukita* - ne inter la verkistoj de iam furoraj "sadismaĵoj". Cetere, la prezento pri la aŭtoro bone reĝustigas, ke Sade "estis antaŭ ĉio filozofa".

Kvankam mi mem neniam trovis spicon en la romanoj de Sade, kiujn ĝenerale mi trovas tedaj, mi volonte rekonas la siatempe revolucian karakteron de la Markizo, talentoplena viktimo de epoko senkompata al neortodoksuloj. Gratulojn al la getradukintoj kaj dankon al la kuraĝa eldoninto!

* Nur malmultajn (pres)erarojn mi renkontis, supozeble neglektitajn ĉe la kontrolado, i.a. du-trifoje ĉe uzado de "sia"...

A. LOPEZ LUNA, Memorajetoj kaj Notoj. Originalo 80-paĝa, eldonita de "Amigos de Lopez Luna", C.C.2507, RA-1000 Buenos Aires. Prezo: 10 gd.

Jen originala maniero prezenti al E-legemuloj memorajetojn pri la infanaĝo: imagi, ke la manuskripton oni malkovros post 1500 jaroj kaj preskaŭ kompleta malapero de ĉiuj spuroj pri nia nuna "civilizo"! La malkovrinto reeldonas ĝin kaj aldonas notojn por prilumi al siaj samtempanoj kelkajn el la misteroj de la teksto! La notojn humure akompanas ilustraĵoj. Sed nian amikon Lopez Luna la legantoj de L! facile rekonos: la ŝajna naiveco de la rakonto, la babilemo (kun oftaj ripetaĵoj) kaj ve, ho ve, la persista ignorado de transitiveco ĉe verboj ŝanĝi, komenci... kaj foje de la uzmaniero de akuzativo. Iom domaĝe, laŭ mi, ĉar tiu rakonto estas amuza, foje nostalgia, kaj povus, se lingve reviziita, taŭgi por komencantoj.

Kristiano.

De ĉiam drogoj kaj droguzantoj ĉieas.

La plej fama halucirogena drogo lanĉita de la hipia movado estas kutime preparolata laŭ tri komencliteroj: LSD (lizergata acido, derivaĵo de unu el la alkaloidoj de la sekala ergoto). Tiu fungo nialanda, kiu iam kaŭzis tiom da damaĝoj ĉe la cerealoj, tute ne estas halucirogena per si mem, sed fariĝas tia post ĥemiaj transformiĝoj. En 1089 erudiciulo el urbo Metz priskribis tute strangan epidemion. Li nomis ĝin "la sankta ardo" (F: "le feu sacré"). Ĝi konsistis el delir-atakoj kaj gangreniĝo de la membroj. Ĝi ŝuldiĝis al la sekala ergoto, muelita samtempe kiel la sekalogreno. Dum la jaroj de malsatego la kamparanoj kribradis ĉion, kio restis en la grenejoj kaj manĝis panon el toksaj farunoj.

En la tuta mezepoka historio svarmas tiaj timindaj katastrofoj. La plej severaj epidemioj komenciĝis dum la XI-a jarcento. Iom antaŭe, la mumiigita korpo de la fama en dezerto vivinta asketo sankta Antono estis reenlandigita de la krucmilitistoj en provincon Dauphiné. Tial ke la sanktulo ne ardis sub la tentoj, li estis taksata kapabla resanigi la malfeliĉulojn de la "sankta ardo" trafitaĵn. Oni amase tien pilgrimadis. La ordeno de la antonanoj estis fondita por helpi la malsanulojn en reakiro de plena fizika kaj psika ekvilibro.

Kaj pasis sep jarcentoj kun teruraj epidemioj antaŭ ol oni scipovis difini la veran kialon de la plago.

Temas pri eta fungo, kiu lokiĝas en la sekalajn spikojn kaj kontaĝas la farunon. Unu el la plej teruraj epidemioj severis fine de la reĝado de Ludoviko la XIV-a. Tamen nur fine de la XVIII-a jarcento la sekala ergoto estis agnoskata kiel la respondeculo. La malsanuloj, pro tio, ke ili ricevis eksterordinarajn viziojn, estis taksataj demonhavaj, ensorĉataj - do endanĝerigitaj. Tiaj deliroj okazis pro spontanaj ĥemiaj transformiĝoj de la eta fungo. Komence de la nuna jarcento la fenomenon sukcesis estigi sciencistoj, kaj tiu eksperimento konsistigas unu el la plej malfacilaj prilaboraĵoj en la tuta historio de la farmacio. Tra la ĥemio de la ergoto oni malkovris substancon neaktivan per si mem, kiun oni pristudis por eltiri el ĝi medikamentojn, suspektante nenian ligan in-

ter la halucinogenaj kaj kuracaj propraĵoj.

La halucinogenajn oni hazarde trafis - tiujn de la 25a substanco el serio da 27. Iun belan tagon dum aprilo 1943, sciencisto deliradis du tagojn, ektuŝinte la ĉi-koncernan substancan okaze de laboratoria eksperimento. Kaj la ĉi-koncerna substanco estis nenio alia, ol... LSD.

La eltrovaĵon oni gardis sekreta, ĉar la laboratorio (en Bazelo situanta) ne volis, ke la nazicj alproprigu al si tian drogon. Estis sciante, ke ili jam priesploris similajn substancojn kun malkapablaj efikoj. La diskonigo venis nur 20 jarojn poste.

Rilate al la halucinogenaj drogoj konstante rimarkindas dekomenca ektimo kun la deziro teni sekreta la drogon kaj ties efikojn. La sekreto povas esti gardata de sciencistoj, eĉ sorĉistoj aŭ empiriistoj. Kiam drogoj tia-specaj ligiĝas kun religia fenomeno, notindas tempo de subpremado.

Ĉiamas la halucinogenaj plantoj. Ni ĵus parolis pri fungo sentoksa per si mem, ĉar ege subtila montriĝas ties ĥemio. Male, aliaj fungoj estas specife halucinogenaj, ĉefe la meksikaj. En 1574 la unuan fojon Franco raportis pri ili. Post ensorbo de kelkaj meksikaj fungoj estiĝas laŭkoloraj vizioj, en kiuj la cerba imagostoko ludas rolon. Kompreneble timegon spertis la misiistoj, ĉar estas konate, ke la diablo ĉieas... Tian punhaltigon ili trudis, ke tute forgesitaj fariĝis la fungoj ĝis la 50-aj jaroj ĉi-jarcentaj.

En 1953 novjorka bankisto pri fungoj tre sciavida veturis al Meksikio kaj renkontis popolgrupojn, kiuj laŭ difinitaj ritoj kaj sub difinitaj kondiĉoj ensorbis tiaspecajn fungojn. Post engluto oni povas resanigi malsanulojn kaj elparoli antaŭdiraĵojn.

La Usonano nepre volas vidi per si mem kaj iun vesperon dum fulmotondras, li konatiĝas kun fungomanĝanto, t.e. la unuokula ŝamano Aŭrelio. La pridemandita Indiano, formanginte 14 parojn da fungoj, antaŭdiras strangajn aferojn tute neatenditajn, kiujn la bankisto post nelonge forgesos, - kiuj tamen efektiviĝos, kiam li hejmen revenos. Kaj tiom impresita li estos, ke li tuj revenos al Meksikio, kolektos la ĉi-rilatajn fungojn kaj petos la la-

boratorion en Bazelo (ĝuste tiun de la sekala ergoto), ilin analizi. Kaj du-tri halucinogenajn molekulojn la ĥemistoj eliras - nur klasikajn, tamen ne surmarketigitajn, ĉar tro danĝeraj ili montriĝas.

Jen kiel komenciĝis por Eŭropanoj la historio pri la halucinogenaj drogoj. Sed ĉe amerikaj, aziaj kaj afrikaj gentoj ili estas de ĉiam konataj kaj uzataj.

Amanito, ruĝa fungo kun surĉapelaj blankaj punktoj, preskaŭ ĉie kreskas, precipe sub la konusarboj. La fungo-speco titolita "muŝmortiga" estas taksata aparte danĝera, ĉar ĝi naskas simptomojn similajn al alkohola ebriiĝo. En Siberio oni ĝin uzas laŭ difinitaj ritoj. Nur unu persono ĝin manĝas : la ŝamano. Ĝin manĝinte, li eniras ekstazan staton favoratan de la ĥemia efiko de la fungomolekuloj. Sub delirostato li kapablas resanigi la frenezulojn kaj histeriulojn. Inter ŝamano kaj malsanulo starigas la sama interrilato, kiel inter psikanalizisto kaj ties paciento. Tamen la ŝamana kuracado daŭras nur 10 horojn kaj estas tute senpaga, ĉar estas li la patro de la gento, al kiu li apartenas. Estas li la enkarniĝo de la spirito de l' bono kaj la spiritajn fortojn li ĉerpas el la transa mondo por savi sian malsanan similulon.

Dum la lastaj jaroj oni esploris la fortajn ligojn inter la meksika drogo kaj la religia fenomeno.

Ne plu temas nun pri fungo, sed pri tre etproporcia kaktus - la plej malgrava planto, kiun oni povas imagi Ĝi nomiĝas "peyotl". (Tio signifas : "kiu faras la okulojn mirigitajn"). Ĝin uzas kelkaj popolgrupoj el la meksikaj Indianoj, kiuj opinias, ke ili originas el mirinda patro en la pratempo vivinta, kiu ilin forliberigis de malamika tribo. Ili transiris senakvan dezerton kaj li tie manĝigis al ili tiun kaktuson, dank'al kies forto ili kapablis marŝadi plurcentojn da kilometroj kaj enloĝiĝi en novan landon : la Sierra Madre. (Tiu legendo nin memorigas pri la epopeo de la Izraelidoj sub gvidado de Moseo). Memore al sia gent-historio tiuj Indianoj ĉiujare pilgrimadas 400 kilometrojn. Tra la dezerto ili iradas serĉe al la kaktus, en plenumo de difinitaj ritoj : ili fastadas, observas seksan deteniĝon, konfesdonas al la tribestro, kolektas la kaktuson kaj komuniĝas : ĉiu ricevas po unu tranĉaĵon. Ĉiuj kune eniras ekstazan staton kaj vidas si-

an diaĵon subforme de cervo, en lando, kie cervo ja ne vivas. (Etnologoj klarigis, ke ĉiuj amerikaj Indianoj venis el Azio antaŭ 10 000 aŭ 20 000 jaroj trans la Beringa markolo kaj konservis en la memoro la cervon, bazon de la tiama civilizacio. La drog-ensorbo ilin resendis al tre forfora pasinteco).

Post hejmenreveno, dum kolektiva kunveno, la tuta tribo partoprenas en la festo (ĉar pilgrimis nur la viroj), kaktan kunmanĝas por kune vidi la cervon-diaĵon. La misiistoj timtremegis... Kelkaj Indianoj al kristanismo konvertiĝintaj komuniĝas kiel la kristanoj, sed ankaŭ je la kakti, laŭ iaspeca sinkretismo, kiun jezuitaj misiistoj laŭdinde respektis.

Afriko estas la tipa lando de ekscitaĵoj. Sur bazaro ĉiam videblaj nigrulo, kiu vendas kolaon (nukso de kolao respondas 3-4 tasojn da kafo). La Afrikanoj konstante bezonas ekscitaĵojn, inkluzive de la famaj amorigaj substancoj...

En Afganlando kanabon oni trovas kvazaŭ ĉe ĉiu paŝo (kanabo estis importata de la Araboj, dum alkoholo estis draste malpermesita).

Kanabo similas urtikon. Ĝi kreskas ie ajn, sub iu ajn klimato. Ĝi verŝajne originis sur la flankodeklivoj de Himalajo. Poste ĝi transiris al Ĉinio, Persujo, antikva Egiptujo. Antaŭ 2000 jaroj la antikvaj kuracistoj precize konis ĝiajn efikojn. La Araboj estis gravaj konsumantoj de tiu anstataŭaĵo de alkoholo.

La krucmilitistoj frontis islaman sekton, kies ĉefo estis titolita "la maljunulo de la montaro". Siajn soldatojn li stimulis per kanabo laŭ tre fortaj dozoj. Ili spertis halucinojn. La ĉefo persvadis ilin, ke ili estas en la paradizo kaj li promesis, ke se ili plenumos sian danĝeran komision, tion ili ĝuos dum la eterneco. Nia vorto "assassin" devenas de fuŝita formo de la sektonomo, ĉar la plenumenda komisiono estis tutsimple... mortigi gravan krucmilitestron. Pro tio estis nepre necese, ke en haŝiŝo estu ĉerpata aparta fervoro kaj vigleco.

Hodiaŭ kanabon oni perceptas kiel tre mildan substancan al sereneco kondukantan. Je fortaj dozoj ĝi tamen pelas al agresemo kaj estigas delirojn.

Ĝi estas kultivata sur ĉiuj kontinentoj krom en Aŭstralio. Sub niaj klimatoj la planto fibriĝas, ne donante halucinogenajn substancojn. En la varmaj landoj tute male ĝi ne fibriĝas sed liveras rezinan eksudaĵon. Kanabo estas entabeligita laŭ proksimume 400 malsamaj nomoj. Ĝi estas potenca sedativo, donas nesentivecon al fakiroj kaj sabromanĝantoj post englutado de fortaj dozoj.

Ankaŭ ĉe opio troveblas la duobla formo milda kaj malmilda. Tiu sekrecio de la ŝiritaj papavaj kapsuloj estas tre malnova drogo el Oriento veninta. La okcidentanoj eliris el ĝi aktivan substancan, t.e. morfinon (opio entenas 10 procentojn da ĝi). Dum la milito okazinta en 1870 morfinon oni egakvante produktis por mildigi la suferojn de la soldatoj ĉe la fronto, sed oni observis fenomenon pri alkutimiĝo. Post prilaborado de la molekulo oni akiris heroinon, kies dependeca efiko multe pli fortas. Nun ĝi estas plejofte uzata laŭ envejnaj injektaĵoj, kio ja estas la plej danĝera uzomaniero, ĉar la drogo rekte eniras la sangofluon.

En 1852 kaj 1858 dum la du opiomilitoj Britujo devigis Ĉinujon malfermi siajn landlimojn al opio el Hindujo.

*
* *

Drog-uzado ĉiam ekzistis ĉe urbaj marginuloj. Ĝi reliefigas la krizon de la nuna socio travivatan. Gejunuloj drogojn uzadas, ĉar ili strebas forfuĝi vivkondiĉojn aŭ vivmomenton laŭopinie neakcepteblajn. Supozeble, ĉar nia socio al ili donas nur vivrimedojn, sed ne vivmotivojn.

S. BONIOL.

"Mi deziras korespondi kun vi. Mia nomo estas Olja. Mi havas 13 jarojn. Mi estas lernantino. Mi lernas en 8a klaso, en lernejo. Min interesas animaloj. Mi kolektas bildkartojn, kalendaretojn, pupojn. Se vi ne povas korespondi kun mi, bonvolu transdoni mian adreson al viaj geamikoj. Mi opinias, ke nia aĝdiferenco ne malhelpos al nia amikeco. Mi esperas, ke nia korespondado estos interesa, utila por ni ambaŭ. Senpacienceme mi atendas vian respondon."
Olja KOBJAKOVA, ul. 9 Maja d.33 kv.204
RUS 660118 KRASNOJARSK, Rusio.

Idilio somera

La suno tre varmas
sed ne tro.
Du knaboj metis tablon
el la meblaro de avino
en la ĝardenon
sur la gazonon
al la ombrorando
de la granda nuksa arbo.

Nun ili ludas kartojn
sur tiu tablo
vestite per ledopantalonoj
kaj en ĉemizoj ĵinzaj,
la bovistajn ĉapelojn
leĝere ŝovinte postkapen.
Nigra kato surtable atentas
ke neniu falsludu.
La limonadoglasoj de la knaboj
brilas kiel diamantoj
kaj sur la blua ĉielo
promenas la sankta nuba familio
sen rimarki pri la knaboj.

Ĉiuj formikoj, kiuj partoprenas
la ludon, povas foriri vivantaj
ĉar Old Shatterhand, unu el la knaboj,
ne mortigas formikojn.

Kaj el la kaseda radio
elsaltas gajaj notoj :
Forire Alabamon
kun la banĝo sur l' genu'...

Hagen Hirte

UNU IDEO DE PATRO KOSTANTINO

Patro Kostantino, kapuceno, fondis la MAC (Asocion de nevidantoj), kiun benis Episkopo Marcenno Morgante kaj kiu pereis pro liaj kunfratoj.

Patro Kostantino mem estas nevidanto, sed tio ne malhelas al li skribi poemojn, kiujn la geamikoj kolektas por eldoni libretojn. Do, li havas pli da amikoj inter la laikoj ol inter la religiuloj.

Antaŭ kelkaj jaroj, kiam la kongreso de UEA okazis en Varna, kaj mi ne partoprenis en ĝi, Patro Kostantino havis la belan ideon organizi du tagojn da libertempo en vilaĝo Abetito de Montegallo en la kolonio de la Parokestro, kolektante kvin-ses nevidantojn, junulojn, virinojn kaj aliajn bonvolemajn personojn.

Patro Kostantino diris al mi :

- Lina, ĉu vi volas partopreni al nia kuniĝo? Ĝi okazos je la fino de julio.

Sciante, ke mi estos libera, mi respondis entuziasme :
"Jes!"

- Nu, ni bezonas iun personon pretan por kuiri. Ĉu vi volus prepari la manĝaĵojn?

Ankoraŭ : "Jes!"

Mi ne diris al Patro Kostantino, ke mi ne scias kuiri, ke hejme kuiras mia patrino, ke kiam mi revenis de la oficejo, mi trovas ĉion preta. Sed la duan jeson mi ne donis senkonscie kaj kun malmola vizaĝo. Mi estas - kaj mi restas - konvinkita, ke pere de amo kaj de bona volo, ke por plezurigi iun, oni povas ankaŭ levi la montojn.

Mi estis tiom entuziasmigita, ke rehejmiĝinte, mi rakontis ĉion al mia patrino kaj al najbarino Teresa.

Mia patrino balancis la kapon dubema, preskaŭ min riproĉante pro mia leĝereco ; sed Teresa atakis min viglege, eĉ bruaĉis je la ideo, ke mi kuiras por multe da homoj.

Ja mi doktorino, verkistino, oficistino... nun ankaŭ kuiristino!!! Tio estas tro! Ĉar ŝi sperta en la hejmaj laboroj, kio estas? La envio kaj la kolero rodas ŝin. Sen la envio kaj la kolero, tute alia estus la reago fronte al mia maltimego.

Mi tamen restis firma en mia intenco. Sed okaze de nova vizito Patro Kostantino diris al mi :

- Lina, mi ne plu bezonas vin por kuirĉi. Venos Lidia, kiu estas profesia kuiristino ĉe la polica kazerno. Vi povus fariĝi la kuirhelpanto. Tiel vi ne havos respondecon kaj vi same estos utila al ni ĉiuj. Senseligi la terpomojn, purigi la verd-aĵojn, lavi la telerojn, balai...

- Jes ja, Patro Kostantino, same bone estas por mi.

Tiel mi trovis min liberigita de unu afero, ke por plenumi ĝin ne sufiĉas la bona volo.

Sed alian tagon Patro Kostantino diris al mi :

- Lina, ankaŭ kiel kuirhelpantinon ni ne bezonas vin. Multaj sinjorinoj proponis sin por tiu humila laboro. Vi povus aranĝi la manĝotablojn...

- Jes, jes, Patro Kostantino.

Nu, eĉ tio ne plenumiĝis. Patro Kostantino diris al mi :

- Estos ankaŭ iu, kiu preparos la tablon. Sed vi, kiu multe vojaĝis, kiu spertis diversajn aferojn, vi povos sidi ĉe la nevidantoj kaj rakonti viajn travivaĵojn. Ankaŭ tio estas granda karitato.

- Vere, Patro Kostantino!

- Brava, bravega! Tio ĉi estas la Dia Volo.

Dum alvenis la tago de la foriro. Difinita finfine estis mia tasko, mi aŭtomobilis ĝis Montegallo. Patro Kostantino, sidanta apud mi, preskaŭ platiĝis mian aŭtomobilon per sia impona egaĵo. Malantaŭ mi sidis du amikoj.

Malgraŭ ke mi devus nur babilu, mi surmetis etan antaŭtukon kaj kun Patro Kostantino ŝajnis al mi esti en la Paradizo. Tamen mi ne havis okazon paroli ĉe la tabloj. Ĉiuj havis siajn distrojn.

Patro Kostantino volis viziti la Sanktejon de la Dipatrino de la Sanktejo Ambro. Foriris tri-kvar aŭtomobiloj kun dek-seksjaruloj, kiuj sidis apud la nevidantoj. Patro Kostantino estis en mia aŭtomobilo.

En la Sanktejo mi rimarkis, ke la Madono movis la okulojn. Mi ŝin rigardadis. Ne estis iluzio. La okuloj vere moviĝis.

- Patro Kostantino, mi ne komprenas la kialon...

- Ĉar vi estas sankta, - li sentencis.

Sed finfine mi sukcesis malkovri la fenomenon : estis la lumoj de la kandeloj, kiuj reflektiĝis sur la okuloj de la Madono, donante la impreson de la moviĝo.

Patro Kostantino tiun vesperon ridaĉis :

- Lina estas sanktulino, ĉar ŝi vidis moviĝi la okulojn de la Dipatrino.

Por la komencantoj

LA NASKIĜLANDO DE ESPERANTO

Jen serio de artikoloj pri Esperanto en Pollando kaj pri konataj polaj esperantistoj. La serion malfermas artikolo pri D-ro L.L. Zamenhof.

1. LUDOVIKO LAZARO ZAMENHOF KREINTO DE ESPERANTO

Doktoro Ludoviko Zamenhof naskiĝis la 15-an de decembro en la 1859-a jaro, en Bjalistoko. Lia patro, Marko, estis instruisto de germana kaj franca lingvoj.

Kiam Ludoviko estis juna knabo, li ĉiutage vidis ne-ĝojajn aferojn. Tiam en Bjalistoko loĝis homoj de diversaj nacioj : Poloj, Germanoj, Judoj, Rusoj kaj aliaj. Ĉiu parolis nur per sia nacia lingvo, do ili ne akceptadis unu la alian.

Tio tre doloris la junan Ludovikon. Li pensis por krei lingvon internacian, dank'al kiu homoj kompreniĝu.

Kiam li studis en lernejo, li ŝatis lingvojn. Jam kiam li estis ĉirkaŭ dekjara, li komencis krei la universalan lingvon. Li volis, ke ĝi baziĝu sur naturaj lingvoj kaj ke homoj uzu ĝin por feliĉo kaj monda paco. Li deziris unuecon, fratecon kaj justecon.

En la 1878-a jaro lia lingvo estis preskaŭ kompleta. Tiam li estis 19-jara, do tro juna por eldoni lernolibron por sia lingvo. En decembro de j. 1878 Ludoviko en sia domo festis la naskiĝtagon de Esperanto. Poste, kvin jarojn li studis en aŭtlernejoj. Samtempe li tradukadis el diversaj lingvoj al Esperanto.

En 1887-a jaro en Varsovio oni eldonis la unuan lernolibron por Esperanto, kiu aperis en la rusa sub la titolo : "Lingvo Internacia. Antaŭparolo kaj lernolibro kompleta".

Poste ĝi estis eldonita ankaŭ en la germana kaj la franca. Sed la verkado de Zamenhof tiam ne finiĝis. Li verkis multajn libretojn por sia "Lingvo Internacia", eldonis vortaron "Fundamento de Esperanto" (en Parizo, 1906 j., ĝi enhavis 2629 vortojn). Li tradukis ankaŭ diversajn librojn i.a. de Goethe, Dickens, Heine, Andersen, Orzeszkowa. En la 1904-a jaro li eldonis antologion de la unuaj tekstoj tradukitaj en Esperanto sub la titolo : "Fundamenta Krestomatio".

En la 1906-a jaro en Boulogne-sur-Mer en Francio okazis la unua Esperanta Universala Kongreso. Tie Zamenhof eldiris sian unuan E-paroladon.

Poste, la esperanta tradukisto Leo Belmont skribis : "Plenkreskaj homoj ĝojis kiel infanoj".

Alia granda laboro de Zamenhof estis traduko de la Malnova Testamento el la hebrea lingvo. Li finis traduki ĝin kelkajn semajnojn antaŭ sia morto.

La 14-an de aprilo de la 1917-a jaro okazis tragika tago por Esperanto : en Varsovio mortis ĝia kreinto Doktoro Ludoviko Lazaro Zamenhof.

2. KONATAJ POLAJ ESPERANTISTOJ.

ANTONI GRABOWSKI

Patro de esperanta poezio kaj granda amiko de D-ro Zamenhof.

Antoni Grabowski naskiĝis en la 1857-a jaro en Nowe Dobra. Profesie li estis inĝeniero-kemiisto.

Li konis ĉirkaŭ 30 lingvojn. Kiel unua en la mondo, li interparolis Esperante kun Ludoviko Zamenhof, kaj poste tre amikiĝis kun li. Grabowski tradukis por Esperanto plej valorajn literaturajn verkojn el diversaj lingvoj. Li tradukadis verkojn de Asnyk, Koponicka, Lenartowicz, Tetmajer, Krasieński, Słowacki, Nickiewicz. En la jaroj 1916-1918 li tradukis "Sinjoro Tadeo" de Mickiewicz.

Je la 1913-a jaro li eldonis ses proprajn verkojn en libro sub la titolo "El Parnaso de Popoloj". Libroj tradukitaj de Grabowski trovis lokon en ĉiuj Esperantaj bibliotekoj de la tuta mondo.

Dum sia tuta vivo li popularigis la ideon de pola literaturo en esperanta lingvo.

La kvaran de julio de la 1921-a jaro en Varsovio mortis Antoni Grabowski, patro de la Esperanta poezio.

Sur muro de la domo ĉe strato Hoża 42 (en Varsovio) oni lokis tabulon kun tiu surskribo : "En ĉi tiu domo loĝis Inĝ. Antoni Grabowski, nelaciĝa disvastigisto de ideo de la internacia lingvo, genia tradukisto de "Sinjoro Tadeo" kaj de aliaj ĉefverkoj de pola literaturo en Esperanto".

KAZIMIERZ BEIN

Tradukisto de pola prozo en Esperanto kaj kunlaboranto de D-ro Zamenhof

Kazimierz Bein naskiĝis en la 1876-a jaro. Li uzadis la literaturan pseŭdonomon "Kabe". Li estis unu el la plej konataj tradukistoj de pola prozo. Profesie li estis okulisto. Je la 1907-a jaro Bein tradukis "La Faraono"n. Homoj konis lin kiel la plej bonan stiliston de Esperanto. Li estas verkisto de "Vortaro de Esperanto".

Je la 1911-a jaro Kazimierz Bein disiĝis de la "lingvo internacia". Preskaŭ kvardek ses jarojn li nek parolis nek skribis nek verkis Esperante. Sed li revenis al Esperanto en la jaro 1957-a.

Kazimierz Bein mortis en la 1959-a jaro.

3. POLOJ KAJ ESPERANTO NUNTEMPE

Ĉiu esperantisto scias, ke la naskiĝlando de Esperanto estas Pollando, sed ne ĉiu Polo. Kial? Eble tial ke Esperanto ne estas tre populara en la lando, en kiu ĝi estis kreita.

Mi interparolas kun diversaj personoj. Multaj el ili eĉ neniam aŭdis la vorton "Esperanto". Ĉu tiel estas bone? - Kompreneble, ne! Mi tre miras, ke Esperanto en sia naskiĝlando ne estas konata.

Homoj diras diverse. Iuj, ke Esperanto estas "juda lingvo" (por Judoj), aliaj, ke lingvo nenatura ne povas kreski en moderna mondo kaj lastaj pensas, ke ĝi estas religio aŭ malproksima kredo. Kial? - Tion mi ne scias. Se iu diras al mi pri tio, mi tuj helpas al li kompreni kio estas Esperanto.

Eble Esperanto estas ankaŭ kredo, sed kredo je la paco, amo, amikeco kaj frateco. Ĉiuj esperantistoj estas fratoj, ĉar ili havas unu celon : sendi al mondo pacon. Sed ekzistas ne nur la grupoj. Estas ankaŭ la homoj, kiuj amas esperanton, kiuj faras ĉion por ke ĝi kresku, kaj helpas al aliaj kompreni kiel grava estas la vorto. Ni esperantistoj scias, ke Esperanto estas lingvo de amo, paco kaj amikeco. Ni povas amikiĝi, renkontiĝi kaj ami dank'al nia karega lingvo. Ni volas ke nia mondo estu plena de paco. Ĉu tion bone komprenas homoj, kiuj ne scias kion signifas Esperanto? Eble jes, sed ne tiel forte.

Ĉu en Pollando oni ne povus prezenti pli Esperanton ? En nia lando oni tro malmulte parolas pri la lingvo en televido, radio aŭ diversaj pollingvaj revuoj. Estas tamen homoj, ĉefe Pola E-Asocio, kiuj helpas al Esperanto. Se oni demandas neesperantistajn polojn : "Ĉu vi scias, kio estas

Esperanto?", pli ol 50 % de tiuj homoj respondos : "Ne!".
Ĉu ni povas tion ŝanĝi? Ne nur povas, ni devas!!!

Ni bone scias, ke Esperanto ne estas lingvo "en si mem".
Ĝi donas al ni ĉion, kion ne donus al ni alia lingvo : ĝi nin proksimigas. Zamenhof kreis Esperanton por ke homoj estu feliĉaj. Doloris lin, ke unuj batas aliajn nur pro tio, ke ili ne povas interparoli, ĉar ne povas interkompreni. Hodiaŭ, kiam en la tuta mondo Esperanto estas proksima, en sia naskiĝlando ĝi estas malproksima...

Per tiu ĉi artikolo mi petas vin, leganton : diru multe pri Esperanto, ĉar **tiom multe kiom ni bezonas Esperanton, tiom multe ĝi bezonas nin por kreski.**

Remigiusz GRZELA
(Starogard GD, Pollando)

Unu ideo de Patro Kostantino (fino de p.56)

Tiam mi respondis triumfe :

- Ne aŭskultu lin! Estis la kandeloj.

Nur la dimanĉon, antaŭ ol reveni al la urbo, mi povis plenumi mian mision.

Sidis antaŭ mi la parokestro kaj la instruistino de la vilaĝo. Mi ne scias, mi ne memoras kiamaniere la parolado falis sur la fizikajn mankojn. La instruistino diris : Estas Digraco, se ni estas invalidoj. Estas privilegio havi fizikan mankon. Estas donaco de Dio. Vidu, Jesuo Kristo mortis sur la kruco, antaŭ ol havi la tempon por esti blinda, surda, lama, senmana, muta... Tiam li lasis tiun heredon al ni, por ke ni anstataŭu lin je la sufero. Jes, estas graco lia elekto por la anstataŭigo!

Al mi tiuj asertoj aspektis bizaraj, por ne diri alion ; pro tio mi turnis min al la parokestro por aŭdi lian opinion, preskaŭ por pravigi min... Sed, surprizo de la surprizoj, la parokestro subtenis la instruistinon.

Ho kiel bela estis tiu libertempo! La libertempo kun Patro Kostantino kaj liaj admirantoj! Sed kiel vana estis mia intenco esti utila! Nek kuiristino, nek kuirhelpantino, nek aranĝantino de la manĝotabloj, nek parolantino!

Reakompanante Patron Kostantino al la monakejo, lia legomisto Gaetano diris al mi vortojn, kiuj kortuŝis min. Kaj tiun kortuŝon mi portis donace al mia patrino apud kiu mi sidis en la ĉambro kie estas la televido, dum vesperiĝis.

Benitaj memoraĵoj!

Lina Gabrielli.

ĈU "Laŭte!" LAŬTU? ĈU "Laŭte?" ?

Aboninte "Laŭte!"-on plurajn jarojn kaj neniam komentinte pri ĝia ĝenerala enhavo, mi tamen hodiaŭ ne povas ne diri pri ĝi mian opinion, speciale ĉar ĝia ĵusa numero, 101, donis al mi novan senton, ke malgraŭ ĉio Esperanto ankoraŭ ne perdiĝis pro degenero, kaj ke valoras ke mi plu vivu, kaj ke mi plu esperu pri kaj laboru por Esperanto.

Ja tuŝis min la konstato, kiom interesa estas la tuta enhavo de tiu Numero 101 kaj kiom tre bona estas la lingvouzo en preskaŭ ĉiuj ĝiaj artikoloj. Kiel bonan lingvouzon mi konsideras la mankon de necesaj neologismoj (i.a. tiaj, da kiuj P.I.V. duonplenas), la konsekvenca uzado de (eĉ se ne konservativaj) vortoj pure Fundament'ecaj (t.e. oficialaj), kaj la striktan obeon al la originalaj gramatikreguloj zamenhofaj.

Se mi nun mencias du problemetojn, du erarojn (aŭ neatentitaĵojn), ne estas por priplendi aŭ kritiki la verkistojn koncernatajn; kontraŭe : iliajn artikolojn mi juĝas altnivelaj laŭ enhavo kaj laŭ lingvouzo. Temas unue pri la esprimo "Kaj tiu postulo ne validas nur post la fino de la kurso" ; tia la frazo signifas, ke nur post la fino la postulo ne validas, dum verŝajne la intenco estis, ke "tiu postulo validas ne nur post la fino de la kurso", kies signifo estas tute malsama (nome ke ĝi validas kontraŭe ankaŭ post la fino de la kurso). Temas do simple pri la loko de "ne", kaj pri eraro sendube kaŭzita de neatento kaj de imito de etna lingvo.

La alia problemeto koncernas la frazon, en alia artikolo, "La kastrado estis specialaĵo de la koptaj pastroj". Ĉu la pastroj estis kastritaj? La celo de la verkisto verŝajne, sed ne sendube, estis ke la pastroj faris la kastradon. La problemeto lumigas malfacilaĵon en Esperanto kaŭzitan de la deziro de Zamenhof imiti la etnajn lingvojn donante al la vorto "de" kvar tute malsamajn signifojn : 1a. aparteno ("La aŭtomobilo de mia patro"); 2a. foresto aŭ foriro ("La vojaĝo de Romo"); 3a. la priagato ("La murdo de la policano (kiu estas murdata)"; kaj 4a. la aganto ("La murdo de la policano (kiu murdas)"). En kazoj de miskomprenblo mi uzas "de" nur por la

unua signifo (aparteno en multaj nuancoj). Por la dua mi uzas "el", "el en", "el de", "el ĉe", ktp (komparu "al en", "al ĉe", "al kun", "al sur" ktp). Pro la genio de Zamenhof mi uzas, ĉe necerteco, por signifo 3a "anta + Ak." aŭ la prepoziciaĵon "ante + Ak." (komparu "koncerne + Ak."; do "La murdo ante la policanon (kiu estas murdata)", kaj por signifo 4a "ata de" aŭ la prepoziciaĵon "ate de" (komparu: "depende de"); do "La murdo ate de la policano (kiu murdas)". Mi diras "pro la genio de Zamenhof", ĉar tiaj uzoj, tute Fundament'ecaj kaj komplete solvantaj miskomprenojn, eblas (kaj uzindas) pro tio ke li kreis la participirdikilojn ne kiel finaĵojn sed kiel sufiksojn. Kelkaj lingvistoj ne komprenas tion, ĉar ili konsideras la problemon etne, nome ili ne komprenas ke lingvismotermine la "finaĵoj" en Esperanto estas nur "o, oj, ojn, on, a ktp, i, as ktp, e, en", kaj ke kontraŭe al en eŭropaj lingvoj la participoj havas krom siaj suprenomitaj kaj ne memstare uzeblaj "finaĵoj" "o, a, i, e, ktp", ankaŭ la arture (laŭ Esperanto) memstare uzeblajn sufiksojn (ant, at, ktp). Do danke al tiu zamenhofa genio miskompreno ne eblas, se oni uzas "ante", "ate", ktp memstare, same kiel "emi", "inda", kaj "ulo". Mi uzas ilin ankaŭ, ĉar la tri aliaj "solvoj" kelkfoje uzataj estas du- aŭ trisencaj, kaj do ne valoras; nome: "al" por signifo 3a (ekz. "La urĝo al Romo", kie "al" havas du signifojn malsamajn; "de" eĉ kvarsencas!), kaj "fare de" kaj "far" por signifo 4a. "Fare de" en ĉi tiu senco venas el "farite de", kiu lasta ĝustas, kaj en kiu esprimo "de" rilatas al "ite", ne al "fari" kiel en "Kion ci faris de tio?"; "fare de" logike povas havi tri signifojn: A. "pri": "Li de la neceso faris virton" → "La virto farita de (el) neceso" → "Virto fare de (el) neceso"; B. "Li sin vivtenas per la faro de korboj" → "Lia vivteno fare de korboj" (ĉar li faras korbojn); kaj C. "Li mortis per la faro de krimulo" → "Lia morto fare de krimulo". Teorie, kaj plurfoje praktike, la malsamaj signifoj de "de" povas interŝanĝiĝi en la tri ekzemploj, kreante miskomprenon. "Far" estas monstraĵo laŭ Esperantologia vidpunkto: unu karaktero de prepozicio estas, ke ĉe verbigo la elemento antaŭ ĝi fariĝas subjekto kaj la elemento post ĝi fariĝas ĝia rekta komplemento: "La flago sur la montpinto" -- "La flago suras la pinton" (ne "La pinto suras la flagon"); "Deco

estu super mono" → "Deco superu monon"; tio nature kaj nemiskomprenige validas por ĉiuj prepozicioj (pro tio la grosjeanmaupinaĵo "peri" estas same stulteta en sia signifouziĝo). Do, "Poemo far tiu poeto" signifus, se ni akceptus "far" kiel prepozicion, "La poemo faras tiun poeton" aŭ "La poemo fara(i)nta tiun poeton" aŭ "La poemo kiu faris tiun poeton". Ĉe prepoziciaĵoj tiu regulo ne validas, ĉar komplikaj nature lingvaj reguloj, depende de la kieloj de formado (prepoziciaĵoj ja estas tre komplikaj gramatikaĵoj!) kaŭzas ĉe verbigo diversajn rezultojn. Sed se iam en la estonteco oni uzos, per reĝresa vortfarado (vidu P.A.G.), purajn prepoziciojn "ant" kaj "at" (aŭ "int" kaj "it"), la regulo ree validos, do "La murdo ant (ante + Ak.) la policano (= oni murdas la policanon)" → "La murdo antas la policanon" (= la murdo estas farata al la policano) kaj "La murdo at (= ate de) la policano" (= la murdo farata de la policano) → "La murdo atas la policanon" (= faratas de la policano). Sed tiaj normalaj verbformoj estas nur "estonta muziko", do ankoraŭ ne uzu ilin, ĉar eĉ "ant" kaj "at" (aŭ "int" kaj "it") apenaŭ uzatas jam (kaj reĝresa vortfarado bezonas ĉiuforte oficialigon; ĝin ne bezonas "ante" kaj "ate" ktp).

Se mi laŭdis la tutajn enhavon kaj lingvon de "Laŭte!", tio kompreneble ne signifas ke mi samopinias kun ĉio. Ekzemple mi trovas kontraŭ-Esperantaj la proponetojn (= "sugestoj") de Patriko, troviĝanta pro tiuj en la malĝusta medio: li devetas aniĝi al societo de Idistoj aŭ por alia mondlingvo. Kia konfuzo, se ĉiuj Esperantistoj (kaj ne-Esperantistoj) farus same kiel li kaj ŝanĝus la zamenhofan lingvon laŭ siaj malsamaj ideoj: centoj da proponoj rondirus kaj oni neniam povus samopinii. Li preferu uzu malpli gravan aferon ol Esperanton por ludi.

Ree ("denove" = "ek de la momento kiam io (aŭ iu) estis nova" (komp. "dekomence", ekz. "Mi denove posedas tiun aŭtomobilon" = Mi posedas ĝin de kiam ĝi estis nova) mi deziras gratuli k-don Baudé pro la bonega kaj unika gazeto. Laŭta laŭdo "Laŭte!"n!

Marcelo Leereveld.